



2\*87.119.

# STARTO

ORGANO DE  
ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



2  
7  
5  
7  
9  
5  
6  
0  
7  
0

3  
9  
4  
3  
5  
2  
6  
3  
4  
2  
8  
1  
9

novinka!

# DOMOVNÍ ČÍSLA

\_\_\_\_\_

\_\_\_\_\_

\_\_\_\_\_

VYRÁBÍ:

\_\_\_\_\_

\_\_\_\_\_

\_\_\_\_\_



**ruch**  
**LIBEREC**

Široká ul. 31  
PSČ 460 31

## DODÁVAJÍ:

Jednoty, Priory Praha, Řempe Brno, Znojmo a nebo  
na dobírku přímo RUCH LIBEREC

Domovní čísla, která vyrábíme z polyesterové pryskyřice v tmavohnědé barvě, mají odstranit stávající uniformitu tabulek, která jsou určena pro povinné označení rodinných domů, chat, chalup a objektů.

Instalace domovních čísel se provádí lepením na omítku nebo obklad lepidlem na porézní a neporézní materiál.

Vhodné je také upevnění na čepy. Pro tento způsob instalace je nutné vyvrtat otvory na zadní straně čísla, do těchto zalepit např. epoxidem čepy, které potom zapustíme do omítky tak, aby čísla měla cca 10 mm odstup od zdi.

Jako čepy můžeme použít běžné ocelové vruty k zasunutí do hmoždinek.

Cena za 1 kus je 15,50 Kčs.

# PROPONOJ

de la 2-a Internacia Simpozio pri Esperanto-Turismo en Budapeŝto de la 13-a ĝis la 18-a de marto 1986 je temo:

"ESPERANTO EN LA ORGANIZATA PROFESIA TURISMO".

La Simpozion partoprenis reprezentantoj de vojaĝoficejoj kaj Esperanto-organizaĵoj el 12 landoj /Aŭstrio, Belgio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, /Germana DR kiel observanto/, Hispanio, Hungario, Italio, Jugoslavio, Pollando, Svedio, Turkio/.

La Simpozio r e m e m o r i g a s

- ke la fava deklaro akceptita de Monda Turisma Organizaĵo en Manila en 1980, kiu substrekas la valoron de la lingvoscio kaj speciale de lingvoj kun universala destino kiel Esperanto, daŭre restas aktuala,
- ke UNESKO en sia 23-a Ĝenerala Konferenco okazinta en Sofio, la 1-an de novembro 1985 per oficiala rezolucio esprimas la deziron, ke la centjarigo de Esperanto estu solene festata en la tuta mondo

n o t a s

- la rezultojn atingitajn en la sfero de la internacia turismo fare de vojaĝoficejoj kaj turismaj organizaĵoj en pluraj landoj kaj aparte la konsiderindajn rezultojn de la Internacia Esperanto-Asocio "Monda Turismo" en aplikado de Esperanto.

Konsciante la gravan rolon de turismo por la disvastigo kaj praktikado de Esperanto, la Simpozio

p r o p o n a s

al ĉiuj Esperanto-organizaĵoj

- detale plani sian agadon por enkonduki Esperanton en la internacian turismon,
- peti, ke vojaĝoficejoj /inter ili porjunularaj/ aperigu broŝurojn, afiŝojn, filmojn, reklamilojn ktp. en Esperanto,
- zorgi, ke la ege bezonataj lernolibroj, fakvortaroj aperu por kontentigi la bezonon,
- utiligi la "Internacian Tagon de Turismo" la 27-an de septembro por la kontaktoj inter Esperanto kaj turismaj organizaĵoj,
- eldoni grandkvante diversajn belajn, modernajn kaj bonkvalitajn Esperanto-informilojn, kiuj estu disdonitaj dum vojaĝoj, ferioj, renkontoj, ekspozicioj, en hoteloj kaj en aliaj konvenaj lokoj por plua evoluo de Esperanto-turismo,
- instigi vojaĝoficejojn kiuj ankoraŭ ne enkondukis la internacian lingvon, utiligi Esperanton plej vaste por profesiaj celoj,

al vojaĝoficejoj utiligantaj Esperanton

- kunordigi siajn aktivadojn por pli efika realigado de iliaj planoj pri utiligado de Esperanto,
- informi unu la alian pri siaj spertoj rilate Esperanto-turismon kiel faras ekz. Express/Hungario/, Esperantotur-Pollando, Espe-

rantotur - Benelukso, Internacia Esperanto-Kursejo /Bulgario/, Esperanto Turizm /Turkio/, "Suno kaj Maro" /Italio/ ktp.

- enkonduki Esperantcan turismajn faklernejojn, precipe en tiuj, kiuj formas la turismajn kadrojn,
- instigi siajn laborulojn ellerni kaj utiligi Esperanton en turismaj terenoj.

Pro la fakto, ke la Simpozio ludas gravan rolon por solvo de aktualaj problemoj de la internacia Esperanto-turismo:

### i n s t i g a s ,

ke ĉiuj vojaĝoficejoj kaj Esperanto-organizaĵoj sendu reprezentanton al la 3-a Internacia Simpozio pri Esperanto-Turismo okazonta de la 19-a ĝis 24-a de julio 1987 en Bydgoszcz /Pollando/ por pritaksi Esperanto-turismon okaze de la centjariĝo de Esperanto.

La 2-a Internacia Simpozio pri Esperanto-Turismo dankas al la organizantoj:

- Hungara Tutlanda Turisma Oficejo
- Junulara kaj Studenta Vojaĝoficejo EXPRES
- Budapeŝta Komitato de Hungara Esperanto-Asocio
- Universala Esperanto Asocio
- Internacia Esperanto-Asocio "Monda Turismo"

Budapeŝto la 18-an de marto 1986

---

---

# somera E-tendaro

---

Esperanto-klubo, loka grupo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Třebíč, aranĝos Someran Esperanto-Tendaron (SET) en tri etapoj:

unua etapo: ekde la 28-a de junio ĝis la 11-a de julio 1987,

dua etapo: ekde la 12-a de julio ĝis la 25-a de julio 1987 kaj

tria etapo: ekde la 26-a de julio ĝis la 8-a de aŭgusto 1987.

La tendaro troviĝas en la tradicia loko apud granda baraĵlago Vranov apud vilaĝo Lančov, distrikto de urbo Znojmo. La instruado de Esperanto okazos en ĉarma romantika regiono ĉiutage escepte de dimanĉo de la 8-a ĝis la 12-a horo en kvin diversgradaj kursoj, nome: A - por komencantoj, B - por progresintoj, C - konversacia, D - por estontaj instruantoj kaj E - por tradukantoj. Detalaj informoj estas en la pasinta numero de Starto aŭ ĉe la adreso: ESPERANTO, CS-674 01 TŘEBÍČ, Ĉeĥoslovakio.

Lančov estas fiero de la ĉeĥoslovaka Esperanto-movado, sed por ĝia funkciado estas bezonataj multaj laboroj: preparado de lerniloj, ilia eldonado, plukonstruado de la tendaro, renovigado kaj konservado de la jam konstruitaj objektoj, sekurigado de litbezonaĵoj kaj nutraĵoj por la kursistoj, instruado, programoj ks. La Třebíčanoj, al kiuj la tendaro apartenas, faras multegon, minimume 80 % de ĉiuj laboroj, sed ĉu ili faru ĉion mem kaj solaj? Helpe estas bezonata precipe de la junularo, ĉar nur la junaj estraranoj povas aranĝi ĵunecon programon kaj atmosferon en la tendaro. Por ĉiu etapo necesas proksimume 10-membra estraro (tendarestro, lia anstataŭanto, program-

/fino sur la paĝo 5/

# Amata poeto

/Medailono pri Jaroslav Seifert, ĉeĥoslovaka poeto honorigita per Nobel-premio/

La poeto Jaroslav Seifert, kiu naskiĝis la 23-an de septembro 1901 en Prago, apartenis al eksterordinare riĉa generacio de talentaj poetoj. Tiu ĉi generacio, nomita laŭ ĝiaj du reprezentantoj Wolker kaj Nezval la volker-nezvala generacio, ekregis en la jaroj post la unua mondmilito la lirikan Parnason de ĉeĥa poezio kaj tenis la sceptron kelke da jardekoj. Sed poetoj Jaroslav Seifert kaj František Halas estis per siaj familiodevenoj plej firme kunligitaj kun la proletariato ol aliaj membroj de la generacio.

Jaroslav Seifert naskiĝis en laborista familio, kiu loĝis en la praga kvartalo Žižkov, kiu estis nomita laŭ la nomo de la fama husena hetmano Žižka, kaj la mondon de sia knabeco li priskribis en memoraĵa prozo Hvězdy nad Rajsťou zahradou /1929/ - La steloj super la Edena ĝardeno - kaj ofte, jam pli aĝa, li al ĝi revenas lirikmaniere, plejparte en verko La panjo. Li ne sukcesis finstudi gimnazion kaj kuraĝe li ekpaŝis sur la vojo de ĵurnalistoj kaj verkisto. Komence liaj artikoloj estis publikigitaj en ĵurnalo Právo lidu/La Rajto de Popolo/, Rudé právo /La Ruĝa Rajto/ kaj en Rovnost /La Samrajteco/. Liaj artikoloj ankaŭ estis publikigitaj en humorista revuo Sršatec /La Krabulo/, en kies redakcio li okupis postenon de la redaktoro. En la jaroj 1925-1927 li laboris en Komunista librovendejo kaj eldonejo kaj post la foriro de Stanislav Kostka Neumann li iĝis ĉefredaktoro de la revuo Reflektor. Post la krizo en la Komunista partio kaj post lia kontraŭo al la partiestro Klement Gottwald /kontraŭ kiu li levis la voĉon kune kun pliaj ses verkistoj en la jaro 1929/li komencis labori en gazetaro de socialdemokratia partio, plejparte en Ranní noviny /La Matena Ĵurnalo/ kaj dum la okupacio de Ĉeĥoslovakio fare de faŝista Germanio li laboris en ĵurnalo Národní práce /La Nacia laboro/. Ekde fino de la dua mondmilito ĝis la jaro 1949 li laboris en redakcio de sindikata ĵurnalo Práce /La Laboro/. En la jaro 1949 li ĉesis kiun ajn ĵurnalistan laboron kaj iĝis verkisto profesia.

Li apartenis al kadro de fondintoj de la asocio de ĉeĥoslovakaj artistoj Devětsil /ĝi estas nomo de kreskaĵo petasito/Petasites hybridus /L./ G.M.Sch./, populare nomata "Nauforto"/ kaj li ankaŭ kunredaktis samnoman revuon Devětsil /en la jaro 1922/. Li redaktis ankaŭ la revuon Disk /1923/. En la jaro 1984 li iĝis la unua ĉeĥoslovaka verkisto honorigita per Nobel-premio por literaturo kaj por tiu ĉi kialo returniĝis al lia verko ankaŭ la atento de la monda publiko. Li forpasis la 10-an de januaro 1986 en Prago.

Lia unuaaĵo Město v slzách /1921/ - La urbo en larmoj - estas unua poemaro proleta de Ĉeĥoslovakio. En ĝi li enkondukis intiman scion pri la mondo de laboristoj vivantaj ne nur en pragaj periferiaj kvartaloj, sed plejparte en la periferio de kapitalisma Respubliko. La revolucio li komprenas antaŭĉio kiel vojon de la mizeruloj kaj senrajtuloj al la homa feliĉo. La urbo plenigas lian animon per la abomeno kaj per la angoro, ĉar en ĝi estas la homo kaj naturo sklavigitaj.

La dua poemaro Samá láska /1923/ - Nur la amo - prezentas stacion de lia animo ravigita per la moderna civilizacio, kiun moderna

grandurbo proponas al siaj loĝantoj. Tiu ĉi poemaro prezentas lian transiron for de la proleta poezio al la postismo, kiu iĝis lia nova maniero, per kiu li serĉas novajn esprimterminojn kaj novajn esprimmanierojn, helpe de kiuj li emus prepari la homojn al aliaj vivmanieroj post la venko de la proleta revolucio.

Liaj plujaj poemaroj Na vlnách TSF /1925/ - Sur la ondoj de TSF - kiun li plene translaboris kaj noveldonis sub la nova nomo Svatební cesta /1938/ - La geedziĝa vojaĝo - , Slavík zpívá špatně /1926/ - La najtingalo kantas malbone - kaj Poštovní holub /1929/ - La poŝtkolombo - prezentas liajn poetikajn opiniojn.

En lia verkaro el unua duono de tridekaj jaroj superas versoj intimaj, plenaj de ammotivoj kaj de la familia feliĉo. Ili rilatas liajn opiniojn pri la hajmo, ili estas plenaj de la ĉarmo de virino. La versoj iĝis pli ardaĵ ol en antaŭaj poemaroj, ili estas sentemigintaj similante al formo de kantoj popolaj. Ili estas Jablko z klína /1933/ - La pomo el la sino - kaj Ruce Venušiny /1936/ - La manoj de Venera.

En la tempo de la munĉena diktato kaj perfido iĝis versoj de Jaroslav Seifert komentario al nacia sorto kaj el lia skribilo verŝiĝis maldolĉaj kaj amaraj versoj, kiuj tuŝis eĉ la radikojn de la nacia ekzistado. La poemaro Zhasněte světla /1938/-Estingu lumojn - pravas la malfeliĉan aferon. En tempo de la faŝistgermana okupacio li korigiĝis al nacia tradicio kaj al la malfeliĉa patrujo per poemaro Vějíř Boženy Němcové /1940/ - La ventumilo de sinjorino Božena Němcová - per kiu li glorigas la aŭtorinon de la delikata verko La avineto. Per versoj li priglorigas Pragon en Světle oděná /1940/ - Per lumo vestita - kaj Kamenný most /1944/ - La ŝtona ponto.

En la liberigita respubliko li eldonas poemaron Přílba hlíny /1945/ - La kasko da argilo - kiu reflektas liajn travivaĵojn el la tempo de kontraŭfaŝista leviĝo de praganoj.

La pitoreskan pejzaĝon ĉeŝan, ĝian delikatecon kaj ĉarmon li prezentis en poemaroj Sel malír chudě do světa /1949/- Ekmarŝis la pentristo en la mondon - , en kiu li proksimigis versmaniere la klopodon de ĉeŝa pentristo Mikoláš Aleš, kaj Chlapec a hvězdy /1956/ - La knabo kaj steloj - , kiu estas dediĉita al alia ĉeŝa pentristo Josef Lada.

De la literaturkritikistoj estis akre kondamnitaj poemaro Píseň o Viktorce /1950/ - La kanto pri Viktorka - pro konjektebla pesimismo kaj senespera amo.

De la tuta popolo estas plej amata lia poemaro Maminka /1954/ - La panjo - , kiu estas plena de varmega amo al la patrino, plena de nostalgio je forkurinta juneco kaj plena de la dankemo al la vivdondantino.

La malsanoj kaj maljuneco lin alkondukas al rezignaĉio kaj al tristo, li mergiĝas en pasinta tempo, en rememoro, sed ankaŭ al aprobado de etaj donacoj de la vivo. La aferojn pravas poemaroj Koncert na ostrově /1967/ - La koncerto sur la insulo - , Halleyova kometa /1967/ - La Halley-kometo - , Deštník z Piccadilly /1979/ - La pluvombrello el Piccadilly - , Morový sloup /1981/ - La pesta kolono - , Býti básníkem /1983/ - Esti poeto - . Proza paraleleco al tiuj poemaroj ŝajnas la ampleksa libro de memoraĵoj Všechny krásy světa /1982/ - Ĉiuj beloj de la mondo - . Seifert estis ankaŭ sperta tradukanto. Li ĉefigis de A. Blok poemon "Dek du" en la jaro 1922, de G. Apollinaire "La mamoj de Tiresio" /1926/ kaj la biblian "La kanto de kantoj" 1958.

Ĉe okazo de la glorartikolo pri Jaroslav Seifert ne eblas preteriri silenteme liajn laŭkazajn malharmoniojn inter poeto kaj ci-

vitano, liajn politikajn erarojn en la jaro 1929, aŭ ĉe okazo de la kongreso de ĉeĥoslovakaj verkistoj el la jaro 1956; kaj finfine liaj eraroj en la jaro 1968 /kiam li ĉefis la Asocion de ĉeĥoslovakaj verkistoj/ ne sukcesis difekti pozitiven, progresan sencon de lia poemverkado, kiu restis firma parto de la socialisma literaturo. Jaroslav Seifert, duobla laŭreato de ĉeĥoslovaka ŝtata premio, nacia artisto de ĉeĥoslovakio, laŭreato de Nobel-premio, restas artisto ŝtatata de la tuta popolo de Ĉeĥoslovakio.

Jaroslav Seifert estis varme ŝtatata ankaŭ de la esperantistaro. Tradukoj de liaj poemoj aperadis ofte en diversaj Esperanto-revuoj. Libroforme aperis Panjo /en 1960 en Jugoslavio/ kaj Kronplekto da sonetoj - embau en traduko de Jiří Kořínek. Ĉe la sama tradukinto estas kompletaj tradukoj de aliaj poemaroj de Jaroslav Seifert, nome de Kanto pri Viktorka, Ventumilo de Božena Němcová kaj Poeto kaj aliaj metioj. Ni esperas, ke ankaŭ ili iam aperos en formo de libro.

Laŭ artikolo de Š. Vlašín en Věda a život  
9/86 kaj aliaj materialoj.



/fino de sur la pago 3/  
estro, instruistestro, instruistoj). Ĝis nun laboris la estraranoj en la tendaro nur por la mango kaj loĝado, nun EK Trébič pagas al tiuj, kiuj plenumis la asocian ekzamenon "pri kapablo instrui", salajron 1000 Kčs por unu etapo (minus 550 Kčs por loĝado kaj mango kaj minus 98 Kčs de imposto), ĉar precipe la gestudentoj bezonas somere perlabori almenaŭ posmonon. Bezonataj estas ankaŭ laborbrigadistoj: estas planata nova societa kambrego, novaj necesoj apud la tendar-enirejo, regule oni devas lateksi la kabanajn ks. Por tiuj, kiuj volas amuziĝi post la vespersignalo, estas konstruita ankelo, por ke ili ne genu la dormantojn kaj ne rompu la noktan trankvilon, kiu estas deviga en la tuta regiono de la lago. Kiu volas helpi, skribu al adreso: Esperanto, 674 01 Trébič.

#### X-a jubilea kongreso de Slovaka Esperanto-Asocio en Nitra

Laŭ la decido de Centra komitato de SEA okazos dum la tagoj de la 19-a ĝis 21-a de junio 1987 la X-a tutslovaka kongreso de SEA en Nitra.

Organizantoj de la kongreso estas Esperanto-rondeto ĉe PKO en Nitra kaj Okcidentregiona komitato de SEA. Oni povas provizore aligi al la adreso: Mária Tomašovičová, ul. kpt. Uhra 9, 915 01 Nové Mesto nad Váhom. Provizora antaŭpago de 300,- Kčs kovras kompletan pensionon kaj hotelan loĝadon. La kongreskotizo (sen loĝado kaj mangado) estas 75,- Kčs. La aligilon oni povas sendi ĝis la fino de majo. Prezento kaj mangado de la partoprenantoj okazos en "Estrada halo" de PKO en Nitra. La aligilo estas akceptota post ricevo de la antaŭpago. Organizantoj ne povos respekti individuajn postulojn okaze de loĝado kaj mangado.

Dum la jubilea kongreso estos uzata okaza poststampilo.

Organizantoj preparas varian programon, ekzemple ekspozicion por filatelistoj, konkurson en pentrado sur asfaltojeto, dancamuzadon kaj aliajn kultursociajn programojn.

#### Internacia Turisma Renkontiĝo de Ercmontaraj Esperantistoj

Loka grupo de ĈEA en Karlovy Vary aranĝos en la tagoj 11-a - 13-a de septembro 1987 "Internacian Turisman Renkontiĝon de Ercmontaraj Esperantistoj" en Boží Dar, distrikto Karlovy Vary. Pli detalajn informojn sendas Marta Milevová, Na vyhlídce č. 41, CS-360 01 KARLOVY VARY, Ĉeĥoslovakio.



# EL FERVOJISTA MONDO

La jubilea jarkonferenco de FS CEA.

En la tagoj 10a ĝis 12a de oktobro 1986 okazis en urbo Kolín jubilea, jam 20a jarkonferenco de Fervojista Sekcio CEA. Laŭ invito partoprenis kolegoj de kunlaborantaj sekcioj el Aŭstrujo, Bulgario GDR, FRG, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Slovakio.

La oficiala programo de la jarkonferenco komenciĝis vendrede la 10an de oktobro, kiam la partoprenantoj alveturis preskaŭ samtempe per trajnoj el Kolín kaj Praha al fervojstacio Cerhenice por komune ekskursi al proksima Fervoja Provlinio de la Fervoja Esplorinstituto Praha. Tasko de la Fervoja Esplorinstituto estas esplora, evolua kaj normigada por fervoja trafiko kaj partopreno je realigado de la rezultoj pri esploro kaj evoluo.

Post salutvortoj kaj akcepto fare de la institutestro ing. Jiří Vysloužil, CSc. kaj estro de la Fervoja Provlinio ing. Polívka oni dividis partoprenantojn en grupojn por pli facile interkonatiĝi kun Fervoja Provlinio, kiu lanĉita en 1963 estas la unua provlinio por normalŝpura veturilaro kaj teknikaj fervojaj instalaĵoj en la mondo. Provezkamenoj sur provlinioj de la komplekso mallongigas la tempon de praktika trafikado de kelkaj jaroj el kelkaj monatoj eĉ semajnoj, kio dum provtrafikado sur normale funkciantaj fervojaj trafiklinioj pre denseco de la trafiko tute ne estus ebla.

Por provezkamado de rulebla ekipo, konstruelementoj de relvojo, signal- kaj sekurig-teknikoj, aŭtomata tekniko en fervoja trafiko kaj fervojaj elektroteknikaj instalaĵoj dum altaj rapidecoj por ĉeĥoslovakaj kaj alilandaj fervojoj oni uzas precipe la pli longan provlinion 13,277 km longa. Por provezkamado konstruelementojn de trakoj kaj por specialaj provezkamenoj de veturilaro sur linio kun radiusoj 300, 450, 600 kaj 800 m estas uzata la malpli longa provlinio 3,951 km longa.

Ambaŭ provlinioj estas elektrizitaj per speciala kontaktokonduktilo, kiu povas transmisi elektran kurenton de la ambaŭ uzataj kurentosistemoj - tiun de la kontinua kun ebla regulado de 0,0 ĝis 3,9 kV en 32 ŝtupoj aŭ de tiu alterna kurento 25kV, 50 Hz kun ebla regulado de 23 ĝis 31 kV en 16 ŝtupoj.

Post spektado de la teknikaj instalaĵoj kaj novaj tipoj de la trakciprovataj lokomotivoj ambaŭ grupoj kuniĝis por partopreni komunan veturado tra la pli longa provlinio, kie radiusoj permesas maksimuman rapidecon 200 km/h. Veturo per speciala trajno kun vaporlokomotivo 423 009 /speciale pruntedonita por tiu celo de teknika muzeo/ kaj du jam historiaj pasaĝervagonoj de tipo Eaa dum belega sunoriĉa aŭtuna vetero plezurigis ĉiujn partoprenantojn.

Post reveno al Kolín kaj loĝigo en hoteloj Savoy kaj Zimní stadion ni denove kunvenis por komune vespermanĝi kaj partopreni la interkonan vesperon.

Sabate post matenmanĝo okazis en hotelo Savoy labora parto de la jarkonferenco, dum kiu oni pritaksis tutjaran agadon de la sekcio kaj pritraktis agadplanon kaj plenumendajn taskojn por venontjara periodo de centjarigo de nia lingvo. Laŭ informo de vicprezidanto ing. Petr Chrdle la sekcio finance memstarigis, sed ĝi komencis



labori kun minusa saldo. Oni do strebos plibonigi krom alia la financon /inter alia per arango de balo kaj memvolaĵ mondo-nacoj/, plialtigi membronombron de la sekcio kaj ankoraŭ pli vaste enpenetri neesperantistan fakan gazetaron, informante pri agado de esperantistoj kaj FS ĈEA kiel pri la internacia lingvo kiel lingvo vivanta kaj uzata. Reprezentantoj de la invititaj FS krom salutpa-roloj partoprenis ankaŭ en diskutado. Indas menci tiu ĉi almenaŭ parolon de Wiesław Rózanowski, prezidanto de Pola FS, kiu inter-konatigis partoprenantojn kun preparoj de la 39a IFEF-kongreso, kiu okazos en tagoj 16-22an de majo 1987 en Katowice.

Post fino de labora parto de la jarkonferenco ni veturis per trajno al proksima historia urbo Kutná Hora, kie ni post komuna tagmanĝo vizitis historian parton de la urbo. Ni spektis kun intereso ne nur la historian juvelon de la urbo, la preĝejon de sankta Barbara, sed ankaŭ aliajn mezepokajn konstruaĵojn. Post spektado de du novgeedzaj paroj elirantaj el la urbdomo kaj de iuj nuptofestaj kutimoj /tiu ĉi parto ne estas planita/ ni vizitis Vlašský dvůr kun monerfarejo, fabrikanta monerojn ĝis la jaro 1727. Ankaŭ vizito de subtera koridoro de la iama minejo de arĝenterco lasis en ĉiuj neforgesablajn rememorojn kaj ekkonon, dum kiom pezaj kondiĉoj devis en subtero labori la mezepokaj ministoj.

Post komuna vespermanĝo en Kutná Hora okazis gaja vespero kun biertrinkado kaj kantado kun akompano de muzikinstrumentoj. Kompren-eble dum kantado povis manki nek kanto de la populara ĉeĥa komponisto František Kmoč el Kolín "Kolín, vi urb' de ben'", esperantigita de Jiří Kořínek.

Dimanĉe antaŭtagmeze oni veturis komune per trajno al ĉefurbo Praha, kie oni kun akompano de esperantlingva ĉiĉerono spektis multajn historiajn konstruaĵojn kaj eksciis interesajn informojn pri la historia Praha, sed ankaŭ pri la nove konstruitaj kaj konstruataj ĝiaj partoj.

Jindřich Tomíšek



### Vizite ĉe polaj kolegoj

En la tagoj 20a kaj 21a de septembro 1986 okazis en la ferio-loko de polaj fervojistoj Wazne Mlyny, proksimume 30 km nordokciden-te de Cenzořov, la 3a tutlanda kongreso de la polaj fervojistaj esperantistoj. Jam vendrede posttagmeze alvenadis partoprenantoj el la tuta Pollando kaj invititaj eksterlandaj gastoj.

Post loĝigo en la feria domo kaj apudaj kabanoj, situantaj proksime de trajnhaltejo kaj ĉirkaŭitaj per bela arbaro, plejmulto de la alvenintaj jam partoprenantoj ne sukcesis rezisti al logado de la suno kaj belega aŭtuna vetero kaj iris promeni tra arbarrica ĉirkaŭaĵo kun tipa aromo de pina rezino kaj maturigantaj juniperaj beroj.

Oficiala programo de la kongreso komenciĝis sabate antaŭtagme-ze per la solena inaŭguro. Krom preskaŭ cent polaj fervojistoj kaj oficialaj gastoj partoprenis reprezentantoj de la fervojaj sekcioj el Aŭstrujo, Ĉeĥoslovakio, Danlando, FRG, GDR kaj Hungario.

LKK-prezidanto Jan Gornik el Katowice salutis ĉiujn partopren-antojn kaj gastojn nome de LKK, traleginte poste salutmesaĝojn de tiuj oficiale invititaj gastoj, kiuj ne povis partopreni persone, inter ili ing. Rodak el DOKP Katowice, Andrzej Pettyn el PEA kaj aliaj.

Post komuna fotado salutparolis prezidanto de Pola Fervojista

Sekcio Wiesław Rózanowski. Sekvis salutparoloj de IFEF-prezidanto Joachim Giessner kaj oficialaj gastoj, inter ili reprezentantoj de la menciitaj eksterlandaj fervojistaj sekcioj.

Post paŭzo okazis labora parto de la kongreso, dum kiu polaj kolegoj pritraktis tutjaran agadon kaj agadplanon por venonta jaro. En ĝi elstaran lokon okupas preparoj de la venonta IFEF-kongreso, kiu en la jubilea jaro de Esperanto okazos en Katowice. La fervojista grupo en Katowice, kvankam fondita nur antaŭ unu jaro, jam sukcese kaj fervore laboras por sukcese plenumi tiun gravan taskon.

La eksterlandaj gastoj dum la labora kunsido partoprenis komunan promenan tra arbara ĉirkaŭaĵo de la kongresejo.

Post bona komuna tagmanĝo okazis kultura programo. La plej grandan intereson ĝuis konkurso - turniro de la trimembraj grupoj, konsistantaj el reprezentantoj de la fervojistaj kluboj el Bydgoszcz, Katowice, Tarnowskie Góry kaj Wrocław por transirpokalo, en kiu venkis teamo el Tarnowskie Góry.

Sekvis informoj pri la lasta 38a IFEF-kongreso en Skopje kun diapozitivaj, dum kiuj partoprenintoj revivigis multajn rememorojn pri la belaj dumkongresaj travivaĵoj, aliaj interkonatiĝis iomete kun solena etoso de nia lasta IFEF-kongreso.

Post komuna vespermanĝo ni kun ĝoa partoprenis la kongresan balon. Kun akompano de la fervojista muzikkvarteto el Tarnowskie Góry kaj sub lerta gvidado de koleginino Henryka Berkowska-Szmatloch ni multe dancis, kantis kaj amuziĝis ĝis noktomezo.

Dimanĉe okazis komuna ekskurso per motortrajno al urbo Ĉenstohovo. Ĉenstohovo /Czestochowa/ estas vojevodia centro de kulturo kaj regiona turismo, ĝi troviĝas ĉe rivero Wisła sur la vojo inter Varsovio kaj Katowice. Sur teritorio de Ĉenstohova vojevodio troviĝas pitoreskaj kalkŝtonaj altaĵoj farantaj unikan, valoran pejzaĝon. Tie en XIV. jc. reĝo Kazimierz Wielki konstruis kastelojn por defendo de regiono Malopolska /Malgrandpola/. Nun ĝiaj ruinoj troviĝas en Mirów, Bobolice kaj aliaj lokoj, kreas interesegan turistvojon nomatan "Vojo de Aglaj Nestoj".

Unua historia mencio pri Ĉenstohovo devenas de XI. jarcento en dokumento de krakova episkopo. Urbajn rajtojn ricevis kavalira vilaĝo en 1377 j. de opola princo Władysław. Grava por estonto de Ĉenstohovo estis alveno en jaro 1382 el hungara Buda de monaĥoj Paŭlinoj, kiuj ekloĝis sur Hela Monto. En la sama jaro en klostra preĝejo oni lokigis Miraklan Bildon de Nigra Madono. Rapidege disvolviĝis ĝia kulto kaj al Ĉenstohovo multnombre venadis pilgrimantoj. Ni trairis ĉefan arterion de la urbo, aleon Plejsanktulino Maria, kiu kondukis nin al klostro de Paŭlinoj sur Hela Monto kaj religia komplekso troviĝanta tie.

Fortikaĵo sur Hela Monto estas fama pro la defendo kontraŭ Svedoj en 1655j. Tiam prioro de Paŭlinoj Augustyn Kordecki heroe kaj sukcese batalis kun siaj defendantoj. Ankaŭ en 1770 j. generalo Kazimierz Pulaski kun siaj patriotoj sukcese batalis kontraŭ caraj soldatoj. En 1908 j. helmonta fortikaĵo sukcese haltigis atakojn de aŭstria armeo. Pro ordono de caro Aleksandro I oni detruis defendmurojn kaj ruinigis ilin en 1913, sed oni rekonstruis ilin en 1943j.

Ni kun intereso trarigardis krom konata baziliko konstantan ekspozicion en "Kavalira halo" kaj tre riĉan klostran trezorejon /Skarbiec/.

Sed Ĉenstohovo ne estas nur pilgrimloko. Pri hodiaŭa vivo kaj disvolviĝo de la urbo decidis la plej granda uzino Bolesław Bierut. Urbo posedas ankaŭ industrion tekstilan, kemian, konsumproduktan. Oni intensive konstruas novajn loĝkvartalojn. Ĉenstohovo estas gra-

va centro de scienco kaj kulturo, Troviĝas tie Politekniko kaj Pedagogia Altlernejo, Teatro kaj Filharmonio, Distrikta Muzeo, kinejoj kaj kulturdomoj. Hodiaŭan Ĉenstoŝovon kun 230 miloj da loĝantoj vizitas ĉiujare kelkaj milionoj da pilgrimantoj kaj turistoj.

Kontentaj kaj kun multaj rememoroj forveturadis dimanĉe partoprenantoj de la kongreso al siaj hejmlukoj. Kun dankvortoj al niaj polaj kolegoj pri la bone preparita kongreso kaj kun deziro nepre partopreni venontjaren 39an IFEF-kongreson, kiu okazos en tagoj de 16a ĝis 22a de majo 1987 en Katowice. Ĝi estos la unua IFEF-kongreso organizata en Pollando ĝuste en la jubilea centjaro de Esperanto. Seriozaj intencantoj partopreni la Kongreson povas ricevi pli detalajn informojn skribante al Fervoĵista Sekcio ĈEA, Jilská 10, 11000 Praha 1 aŭ rekte al konstanta adreso: 39a IFEF-Kongreso, Slaska DOKP, Al. Rożdzienskiego 1, PL 40-202, Katowice, Pollando.

Jindřich Tomášek



Reprezentanto de FS ĈEA post salutparolado dum solena inaŭguro transdonas simolan donaceton al prezidanto de pola FS Wiesław Różankiewicz



Partoprenantoj de la kongreso de polaj fervoĵistoj dum la komuna fotado

---

---

# Efektive okazis

## Esperanto savis min

Mi volus rememori jeron 1963, kiam mi partoprenis UEA kongreson en Sofio. Ĝi estis mia unua kongreso, sed samtempe mia unua vojaĝo en Bulgario.

Pri impresoj de la kongreso mi ĉi tie ne volas rakonti, kvenkam estis por mi tre kortuŝa ekkono, ke per unu sola lingvo povas tiel bone interkompreni kelkaj miloj da homoj el 48 landoj.

Ĝaŭdon, la tagon de ekskursoj, mi volis eluzi por la vizito de Nigra maro, kiun mi ankoraŭ ne vidis. Kun semideano Jan mi aĉetis flugbiletojn al Varna kun informo, ke revenajn biletojn ni povos aĉeti en flughaveno Varna. Ni ne havis tro da mono, ĉi sufiĉis nur por la vojaĝo kaj eble por 2-3 limonadoj. Por ni ambaŭ estis pli grave unuafoje vidi la maron, ol suferi sen manĝaĵo la tutan tagon. Ni bone alteriĝis al Varna kaj de tie buse al Oraj Sabloj. La buso estis plenplena de homoj, ni staris en ĝia angulo ĉe juna bulgaro. Post momento ni ekbabilis kun li iomete ruse kaj slovake. Li estis tre afabla kaj proponis akompani nin al la plago kaj montri ĉion bezonan. Parolinte ankaŭ pri si, poste li demendis, ĉu ni hazarde ne havas iom da ĉeĥoslovaka mono. Post du monatoj li vojaĝos al Slovakio kun sia dancgrupo kaj ilia poŝmono estos tro malgranda.

Hazarde mi havis ĉe mi 100 Kčs. Vi ne povas imagi, kiel la bulgara belulo superŝutis nin per ĉio ebla. Li konstatis, ke ni ne povas mendi al ni tagmanĝon, nehavante sufiĉe da levoĵoj, do li subite alportis amason da fruktoj, panetojn kaj por vespero invitis nin en hotelon Ĉajka al riĉa vespermanĝo kun aperitivo.

La forflugo de aviadilo estis planita por 24-a horo, por kiu ni povis aĉeti flugbiletojn kaj nia nova bulgara amiko akompanis nin al flughaveno. La tutan tagon ni fartis bonege kaj estis feliĉaj ankaŭ pro belega naĝado en la varma maro.

En aviadilon ni eksidis vere lacaj. La tempo de starto jam pasis, sed io okazis. Ni aŭdis laŭtan voĉon de stevardino. Bulgare ni ne komprenis, tamen kelkajn vortojn ni kaptis. Jan trarigardis niajn flugbiletojn kaj subite konstatis, ke mia bileto havas stampoŝton de plua tago. Tia eraro de la oficistino ĉe la ĝiketo! La stevardino jam komencis trarigardi biletojn de ĉiuj pasaĝeroj. Ĉu ŝi devigos min forlasi aviadilon- nun dum noktomezo? Jan flustris al mi: "Klopodo ne kompreni, parolu nur Esperante!" Kaj stevardino jam staris ĉe mi. "Kontrolo de flugbiletoj". Tenante bileton en la mano mi transdonis ĝin kaj ŝi tuj ekvidis la daton. Kio ajn ŝi diris al mi, ĉiam mi rapide respondis esperantlingve: "Kion Vi volas de mi? Flugbiletojn mi havas. Mi ne komprenas al vi!" Kelkfoje mi tion ripetis.

Dank' al dio, ke ŝi ne demandis, de kiu lando mi estas kaj ŝi ne volis vidi pasparton, ĉar certe iu troviĝus en la aviadilo, kiu povus klarigi al mi la aferon almenaŭ slovake, ke mi devus kompreni. Pluajn pasaĝerojn ŝi jam ne kontrolis, sed Jan aŭdis, ke stevardino petis bulgaron, kiu jam ne trovis sidlokon, ke li vojaĝu per matena aviadilo anstataŭ mi, ke la virino estas eksterlandano kaj ŝi tute ne komprenas.

/fino sur paĝo 21/

## RECENZOJ de ADOLF STAŬURA

Canko Murgin: PROGRESEMAJ MOMENTOJ EN LA IDEOLOGIO L.L. ZAMENHOF. Kolekto de studoj. Eldonis Bulgara Esperantista Asocio, Sofio, 1985. Formato 20,5 x 14,5 cm, 66 paĝoj.

La aŭtoro priskribas malfacilajn komencojn de eldonado de la monata gazeto "La Esperantisto" en la jaroj 1889-1895, kiu estis la unua Esperanta periodaĵo. Poste li transiras al la "interna ideo" de esperantismo kaj konstatas, ke ĝi estas "speco de ideologio en Esperanto-movado dum la komencaj 18 jaroj" /p.11/ kaj konkludas, ke "Zamenhof atribuis al la interna ideo efikon de panaceo kontraŭ la sociaj difektoj de kapitalismo" /sampaĝe/. Sed proksime al tio Canko Murgin konstatas, ke la "interna ideo" naskiĝis jam en decembro 1878, kiam 18jara Zamenhof festis kreon de sia "lingve universala" kun grupeto da diversnaciaj samklasanoj en sia hejmo kaj ili kantis, ke malamikeco de nacioj devas feli kaj homaro devas unuigi sin en unu familion. Tio do esprimas la idealon, ke la homaro vivu en paco.

Poste Canko Murgin citas multloke fragmentojn el poemoj kaj diversokazej paroladoj de Zamenhof, liajn vortojn pri amikeco inter nacioj, pri rompad kaj falo de muroj inter ili ktp. Multe da loko estas dediĉita al la "religioj" de Zamenhof - hilelismo kaj homaranismo. Fine Zamenhof diris, ke la interna ideo kaj homaranismo ne estas identaj, tamen ili estas tre parencaj.

Sur p. 58 oni legas: "...Zamenhof pentris la bildon de la estonta socio sub la inspira influo ke komunismaj ideologoj Karlo Marks kaj Frederiko Engels."

Restas nenegebla la fakto, ke Zamenhof sopiris pri vivo en paco kaj feliĉo de ĉiuj homoj, kaj tion oni vere devas alte aprezi. Canko Murgin havas la meriton, ke li kolektis ĉiujn tiujn pensojn en unu libro.

Ĉe la fino de la libro estas aldonitaj biografioj pri Alfred Thonney el Lozano, pri hispano Julio Mangada Rosenörn kaj pri Felikso Zamenhof, frato de nia Majstro. Ili ĉiuj apogadis la ideojn de L. L. Zamenhof pri pli bona ordo de la tuta homa socio, Felikso verkadis ankaŭ poemojn en tiu senco.

La libro estas ofsete presita laŭ tajpaĵo. Klopodante havi ĉiam rektlinian marĝenon, la tajpinto iam kurioze dividis la vortojn, ekz. jam sur la unua linio p. 3 oni vidas Zamenh- kaj sur la dua linio of. Simile sampaĝe kontr-ibuoj, Rys-zard, artikolo-jn ktp. ktp. Tio tamen ne forigas la fakton, ke la marĝenoj ne estas rektliniaj, sed iom "kombilaj". Plu iom ĝenas uzado de ŭ anstataŭ ŭ.

La lingvo ne estas tute senripoĉa, ekz. sur p. 6 oni legas "eldonanto" anstataŭ "eldonado", plurfoje oni legas pri la gazeto "la Esperantisto" anstataŭ la ĝusta "La Esperantisto" kaj simile. Sur p. 9 oni legas pri "eksploatado de homo kontraŭ la homo", pli bone certe estus "fare de" aŭ "far" anstataŭ kontraŭ kaj la artikolo "la" ne konvenas. Sur p. 58 estas ellasita la akuzativa -n, ĉar oni legas: ...la fable enigmo pri "rompado de la muroj" Zamenhof mem tre precize deĉifris/anstataŭ "fablan enigmon"/. Mi ne indikas ĉiujn neperfektaĵojn.

Generale la libro estas utila kaj oni povas el ĝi multe ĉerpi en tiu senco, ke d-ro Zamenhof estis ne "nur lingvisto", sed ankaŭ pensulo pri pli bona vivado de ĉiuj homoj sur la tero. Sed pli ol 200 jarojn antaŭ li skribis nia Jan Amos Komenský /Comenius, Esperante Komenio/ pri scienca regado super la tuta mondo, por ke ĉiuj homoj povu bone vivi. Kaj kion ni havas anstataŭe?

La verko de Canko Murgin estas bona argumento kontraŭ tiuj homoj, kiuj vidas en Esperanto nur ian elpensadon, sen idea graveco por nia socialisma socio kaj sen troa utilo por homoj, uzantaj ĝin.

---

Henryk Sienkiewicz: NOVELOJ. El la pola tradukis Lidia Zamenhof. Eldonis RITMO, eldonkleriga centro, Varsovio 1985. 65 paĝoj, form. 12 x 18 cm, kortonita.

---

Tiu ĉi kolekto de noveloj aperis jam en la j. 1925 ĉe Ferdinand Hirt & Sohn en Lepsiko. Andrzej Petryn verkis al ĝi enkondukon, rakontante pri verkoj de Sienkiewicz tradukitaj en Esperanton, ankaŭ pri liaj aliaj gravaj verkoj netradukitaj, kaj pri sorto de la postmortaj restaĵoj de la aŭtoro, mortinta en Svislando. Ankaŭ la tradukintino, subskribita "Lidja", rakontas unue pri la fama Nobel-premiito kaj karakterizas liajn verkojn, al esperantistoj jam konataj. Poste sekvas kvin noveloj, kiuj estas vere legindaj. La aŭtoro priskribas malfeliĉan mortadon de malriĉa skulptisto, poste sekvas novelo pri vivo kaj konduto de maljuna bienservisto. La tria historioto okazas en helena Ateno verŝajne en la 4-a jarcento antaŭ nia erao kaj ĝi estas iom ŝanĝita mito pri la skatoleto de Pandora. La kvara estas hinda legendo pri Kriŝno kaj lotuso kaj la kvina rakontas pri malfeliĉa sorto de dekjara vilaga orfino. Ĉio estas tre interese kaj atentokapte prezentita kaj pravas la altan nivelon de la aŭtoro.

La lingvaĵon de la malfeliĉa Lidja oni devas preni de tiu vidpunkto, ke ŝi tradukadis antaŭ pli ol 60 jaroj. Nun oni esprimus tute alimaniere multajn aferojn. Ekzemple sur p. 19 estas en kvin linioj sepfoje uzita -ad-, laŭ la nuna vidpunkto oni pli konvene esprimus tion per kompleksaj verboj /estas -anta ks./. Neniam ŝi uzas la laŭ mi neĝustan "nomiĝi" /mi dirus "nomiti"/, ŝi skribas "esti nomata Nikolao" /p.24/, "kiel ĝi estis nomata?" /p.29/ ktp. Sur p. 28 kaj 30 oni legas "Varŝavo", sur p. 26 kaj pluaĵ estas "pistonoj", en PIV kaj aliaj vortaroj netroveblaj, simile "bengaloj" sur p. 51, "heterinoj" sur p. 45 /eble hetajroj?/. La esprimado estas iam stranga: p. 13: "eltiriĝinte el la lito", samloke "La fenestro de la laborejo eniris en korton", iuj propraj nomoj estas nun aliforme uzataj ktp. Tial la libro vere ne povas esti rekomendata al novaj esperantistoj.

Oni eble eldonis ĝin por honorigi la duoblan datrevenon de Sienkiewicz /1846-1916/. Estus tre konvene prezenti biografieton de la tradukintino Lidja Zamenhof, kiu tiel malfeliĉe perdis sian vivon dum la faŝista teroro en Varsovio, kaj se oni estus aldonita klarigojn ĉe diferencoj, kompare al la nuntempa esprimado en Esperante, la libro certe konvenus por pli granda rondo de legantoj.

Masaji Iŭakura: LA TAGO DE SENAERIGO. Tradukis Sejŝro Nomra, ilustris f-ino Joŝiko Ueda. Eldonis Biblioteko Kolombo, Numazu, Japanio. 87 p., 13 x 18 cm, kartonita.

---

La libreto enhavas antaŭparolon "Antaŭ iom longa tempo" kaj du rakontojn pri vivo en japana vilaĝo. Aldonitaj estas foto de la aŭtoro, lia koncize biografio kaj postparoloj: Vortoj de la aŭtoro kaj Notoj de la tradukinto.

La unua rakonto, laŭ kiu la libreto estas nomita, priskribas maltrankvilajn juliajn tagojn en la j. 1910, kiam diskonatiĝis la famo, ke je certa tago la aero forflugos de la terglobo kaj dum 5 minutoj, dum kiuj homoj ne povos spiri, ili ĉiuj mortos. Unusola helpo estos, havigi al si provizon da aero en kaŭĉukaj sakoj aŭ en biciklaj aertuboj. Sed la prezoj de tiuj objektoj terure altiĝis kaj kion ĉion la vilaĝanoj kaj instruistoj aranĝis por savi sin, tamen fine rezigne atendante la morton, pri tio estas interese legi. Temas pri la tago, kiam - kiel oni rakontis tiam en nia lando - nia terglobo enpenetros la voston de la Halley-kometo kaj ĉio pereos.

En la dua rakonto, duoble pli longe ol la unua, oni legas pri malagrablaĵoj, kiujn suferas patrino, kies filo malsaniĝis je neŭrastenio. Li suferas de grandaj fobioj pro diversaj aferoj ĉu parte efektivaj, ĉu nur imagataj, serĉas helpon en libro pri sorĉado, sed tiu tute trompas lin, ĝis fine lia patrino tamen trovas vortojn, per kiuj ŝi tranĉas sian malfeliĉan bubon.

En postparolo la aŭtoro /nask. 1903/ diras interalie: "Ĉetere mi, aŭtoro, kiu ja sendube apartenas al homoj tiel nesentemaj, devas konfesi, ke nun mi mem efektive fariĝas "bubo ĉiam maltrankvila" ne malpli ol tiu en la rakonto... efektive minace staras tuj antaŭ nia nazo la grava danĝero, por kiu ni riskas la vivojn de la terglobo kaj nia homaro... Por mi, unu el japanoj, kiuj travivis la suferon de inferoj en Hiroŝima kaj Nagasaki, la afero estas brule urĝa problemo. Tiuj, kiuj kun moko prenos tion por paranojo, ja devas esti, se ne diabloj, nur malmultaj maniuloj pri nuklea armilaro, ensorĉitaj de diabloj..."

En la libro estas pluraj lokoj gramatike korektindaj. Mi ne komprenas, kion la aŭtoro volas diri sur p. 4: "...de branĉo de granda kriptomerio tebolilego pendiĝis malsupren..." La vorton "kriptomerio" /speco de arbo/ mi trovis nur en Enciklopedieto japana, sed mi ne scias, kio estas "tebolilego".

La ilustraĵoj estas siaspece belgustaj, nur ŝajnas al mi iom stranga, ke sur ĉiu vizaĝo mi vidas brovojn kaj okulojn longaj ĝis oreloj.

ANTOLOGIO DE PORTUGALAJ RAKONTOJ. Kompilita de Manuel de Seabra. Eldonis Grupo de Admirantoj de Zemenhof, Lisboa 1959. 220 p., 12 x 19 cm.

---

En la antaŭparolo diras la kompilinto: "Literaturo estas la spegulo de l' popolo". Kaj pretiginte tian spegulon, li prezentas al ni selektitajn verkojn de 14 portugalaĵ geverkistoj /du virinoj/, po unu rakonto de ĉiu.

El la aŭtoroj apartenas ses al la novrealisma skolo. El iliaj rakontoj nur du estas vere drastaj kaj unu rakontas pri malfeliĉa akcidento en ŝakto. La aliaj historietoj priskribas ekzemple noktan aventuron de ŝtata oficisto, kies kvalifiko kaj labormoralo estas minimumaj, kaj li savas prostituitinon. Kelkaj rakontoj prezentas

el legantoj historietojn de homoj, vivantaj en mizero. Ankaŭ oni legas pri puberulo, alportanta hejmen vesperton kaj ellasanta ĝin antaŭ gegastoj de siaj gepatroj. Neceseja gardistino batalas pri pli bona vivo de sia filo kaj kiam ŝi sukcesas trovi por li konvenan postenon, ŝi ĝisvivas konsternan trompon fare de li. Oni legas pri afrikano, kiu eksterleĝe venas Usonon per kargoŝipo kaj tie ricevas neesperitan Kristnaskan donacon de policano. Samba estas nigra afrikano, kiun neniu aĉetis ĉe sklavovendado kaj ŝia vivo tial finiĝas pere. Ankoraŭ unu rakonto prezentas oldan grizheran kaj grizbarban nigrulon, kiu devas pene laborgajni sian ekzistadminimumon kaj mizere mortas. Escepta estas historieto pri vivo de koko. Nu, tiu certe ne estas nur portugaleska. La rakontoj de la du virinaj aŭtorinoj priskribas familiajn interpersonajn rilatojn.

La rakontojn esperantigis ok tradukintoj. Oni povas dividi ilin je du grupoj: unuj uzas nenecese kompleksajn verboformojn /estas - anta ks./, ĉe aliaj tia uzado ne ekzistas kaj tio estas por ili pluso. Sed ĝenerale ne eblas diri, ke la lingvo estas senreciproka almenaŭ ĉe unu aŭtoro. Ofte oni trovas uzadon de "alie" en la senco "aliloke", eĉ "alien" /aliloken/, "tie kaj alie", "aliam", ankaŭ "iulo, tiulo", kiuj ne estas gramatike pravigeblaj. Iam ĝenas la uzado de prepozicio "je", kiam oni povus uzi pli konkretan prepozicion: "Je la fino de la muro" - "ĉe la fino...", "Regionoj apudaj je la Grandaj lagoj"-Kial ne "al" anstataŭ "je" /p.81/ aŭ "Regionoj apud la...". Pri iuj aferoj oni devas miri. Kion signifas "Mia oficejo estas la stelejo"/p.15/? Sur p. 85 aperas "juninoj", sed ankaŭ "junulinoj". En la laste rakonto estas almenaŭ naŭfoje uzita la vorto "maljunino", kvankam "maljunulo" ankaŭ unufoje aperas. Kaj mi povus citi plu aliajn gramatikajn kaj stilajn malglatadojn.

La almetita folieto "Bonvolu korekti" enhavas nur 9 preserojn, sed en efektiveco estas pli multe da ili. Se ne estus tiom da malperfektaĵoj, la legado de la libro estus multe pli atentokapta, ĉar pli granda nombro de historietoj estas vere interesaj.

Eduardo Novembro: ETAJ RAKONTOJ. Eldonis Portugala Esperanto-Asocio, Lisbono. 1984. Kovrilon desegnis O.J.R. Crispim, 127 p., 12x17 cm.

La libreto enhavas 16 rakontojn, el kiuj 15 la aŭtoro verkis en la portugala lingvo kaj mem tradukis, la lasta estas verkita originale en E.

La rakontoj priskribas krizajn momentojn en vivo de homoj. En la unua, "La morto de l' artisto", estas sur kvar paĝoj tiom da eventoj, ke el ili povus esti kreita romano. Nu, la aŭtoro kontentigis pri nura konstato de multaj faktoj el vivo de pentristo, kies ekzistado abrupte suprenleviĝas kaj finiĝas en mizero. En la dua historieto viro perdas edzinon, kiun li antaŭe delogis, eĉ sian infanon. "Kortuŝa ploro de infano" rakontas pri orfa knabeto, mizere surstrate vivanta, kiun savas simile mizera oldulo. En "Karnavala trompo" honesta junulino lasas forlogi sin en domon, en kiun ŝi neniam estus enirinta. Plu ni povas legi pri ŝtelisto, pri infano per aŭto faligita, pri kalkulficisto vane serĉanta pli bonan postenon-ĉi tie scias la aŭtoro ironii, pri analfabeta laboristo veninta en urbon el vilaĝo eĉ kun edzino kaj infano kaj vane esperinta trovi en urbo pli bonan vivon, ktp. La plej drasta estas "-La juĝato, leviĝu!" La fina rakonto estas sciencfikcia kaj ni sciigas, kiel nia



ĈAPITROJ PRI LA SINDEFENDO

© Ing. Ivan Špička kaj Ing. Jindřich Novák

fika aŭ eĉ senefika. En tiu ĉi libro oni konatigos kun kelkaj praktikoj, kiujn ni ankoraŭ ne kalkulas en la mensan sinpreperon, sed kiuj malgraŭ tio povas - taŭge aplikitaj - la mensan staton de la batalanto ege plibonigi.

1.4. Kiam ni batalos?

Ni imagu sinjoron X, kiu iras vespere hejmen tra iu nemulte prilumita kaj preskaŭ forlasita strato. Estas agrabla antaŭvespero, sinjoro X pensas pri bona vespermanĝo kaj memkomprene atendas nenion malbonan. Subite li estas haltigita de nekonata viro, kiu petas fajron por sia cigaredo. Plue, sinjoro X memoras nenion. En malsanulejo li estas informita, ke li estis insidatakita, frapita sur la kapon kaj prirabita. La paciento iom post iom rememoras la okazintaĵojn de tiu vespero, sed detalojn li revokas malrapide kaj ĝene.

Tamen la situacio povis evolui ankaŭ alie. Sinjoro X ekzemple ekrimarkis, ke li estas sekvata de nekonata viro, kiu paŝo post paŝo pliproksimiĝas. En la momento, kiam la nekonatulo atingis lin, sinjoro X turniĝis. La atakanto, ni jam povas nomi lin tiel, kaptis la sinjoron X krude je la kolumo kaj postulis monon. Poste la sinjoron X, kiu havis ĉe si nur dek kronojn, la seniluziigita atakanto kolerege per pugno surterigis.

Estas ankaŭ eble, ke sinjoro X estas haltigita en parko fare de grupo de junuloj. Ili unue ĝenas kaj ofendas lin. Fine li estas bategata nur por amuziĝo de la atakantoj.

Ni pensu nun pri la tri menciitaj ekzemploj de naskiĝo de la sindefendo-situacio. Kion povis fari sinjoro X? Kie li faris eraron? Ekesto de la sindefendo-situacio estas la unua kaj ni diru rekte ofte la plej decida fazo de la tuta batalo. Unu el la plej gravaj postuletoj de la monosignala sindefendo tekstas: la defendanto devas per sia kondutado ĉiam konservi sufiĉan tempon por prepari sin al la batalo (pri tio temas la t.n. produktado de la sindefendo-situacio). Ĝi, kromalie, rezultas el la postulato menciita sur la paĝo 4. Tial la sinjoro X, revenante hejmen tra malluma strato, ne permesu al nekonata homo pliproksimiĝi. La truko kun peto pri fajro por cigaredo estas cetere tiom antikva, ke sole tre naiva homo povas konsideri ĝin serioze. Ankaŭ en la okazoj, kiam nekonatulo demandas nin nokte en flankensitua loko pri la vojo, klopodas ekinterparoli k.t.p., ni ĉiam tenu almenaŭ tian distancon for de li, ke li ne povu ekataki sen antaŭa elpaŝo. Tamen pri sekura distanco ni zorgu ankaŭ aliookaze. Ni ekzemple neniam iru hejmen tre proksime preter dikaj arboj, malantaŭ kiuj povus kaŝi sin atakanto, ni

evitu ankaŭ domajn veturtrapasejojn, murojn, de sur kiuj iu povus salti sur nin aŭ ĵeti ion k.t.p. Se estas eble, ni iru meze de strato aŭ sur la rando de trotuaro. Tiel ni havas relative sufiĉe da tempo por prepari nin al eventuala batalo. Se ni iras tra vojparto, kiun ni taksas danĝera kaj se ni ne povas eviti ĝin, ni antaŭripensu, kion ni estus farontaj okaze de subita atako. Reala danĝero minacas plej ofte ekde la momento, kiam ni rimarkas homon, kiun ni evidente interresas. Do, se iu sekvas nin kaj se ni ne plu povas fuĝi, ni elserĉu iun okazan armilon (ŝtonon, bastonon,...)(+), turnu al la kontraŭulo nian frunton kaj ekbatalu. Pri tio ni ankoraŭ skribos. Se ni vidas, ke sur nia vojo troviĝas ebria grupo, ni preferu, laŭeble, eviti ĝin. Decido, ĉu eviti sindefendo-situacion aŭ prepari sin al batalo, dependas memkomprene de tio, kion ni volas riski kaj kion ni scipovas. Tamen certe estas pli bone iom skeptiki pri niaj scioj kaj scipovoj ol trotaksi ilin.

En la sindefendo-situacion povas disvolviĝi ankaŭ interparolo, trapasinta ĝis kverelo. Ni povas esti atakitaj vorte pro iu reala aŭ konjekta kulpo. Kiel agi ĉi-okaze? Kiel sekurigi, ke la situacio ne transpasos en la sindefendan? Se ni vidas, ke nia oponento ne kapablas pensi kaj agi racie kaj sen antaŭjuĝoj, estas sencele daŭrigi la interparolon. Ni ĝin simple finu. Memkomprene ni klopodu, ke nia agado ne estu ofenda. Se ni kulpiĝus per ia kulpeto aŭ se ni farus ion, kion alia persono taksas malplaĉe kaj se ni volus la konflikten situacion transformi al ordinara vivsituacio, estas plej laŭcele peti gentile pardonon. La plimulto de homoj ne kapablas tiuokaze daŭrigi la kverelon. Kaj evidente ankaŭ tiam ofte estas pli bone foriri. Se ni vidas, ke iu homo volas kvereli, ni ignoru lin kaj se estas eble, ni foriru.

Al iuj legantoj tiuj ĉi konsiloj eble ne plaĉas. Ili preferus frakasii oponenton en vorta duelo. Tio ankaŭ eblas. Tamen tio supozas grandan arton, kiu certe ne estas facila. Ĝi postulas multe da sciigo, grandan pretecon, totalan trankvilon kaj fine necesan praktikon. Ĉiam minacas ebleco, ke la oponento ne paciĝos post sia vorta malvenko kaj klopodos solvi la situacion uzante perforton. Tiuokaze komenciĝos la sindefendo-situacio.

Ĉu nia ekscitita oponento ofendas nin? Ni demandu alie: ĉu oni povas konsideri vortojn de primitivulo kiel ofendon? Se iu taksas kiel sufiĉan motivon por apliki pezan frapon la vortan konflikton aŭ diferencon inter opinioj, li stariĝas sur la nivelon de sia oponento kaj nia libro ne estas destinita por li. La taksado de nia agado fare de homo, kiu ne scias ĝustan solvon de la situacio, ne interresas nin. La plej grandaj venkoj ordinare ne estas videblaj por ĉiu. Se temas nur pri la t.n. ofendoj, ni cedu ĉiam, kiam konflikta situacio, ofte pro nia mallerteco, progresis ĝis tiu ĉi punkto.

Ni montris sur la ekzemploj la komencon de kelkaj sindefendo-situacioj. La praktikon pri la produktado kaj transigo de unu tipo de situacio en alian tamen devas ĉiu akiri enkadre de la reduktita kurso mem. Estas tre utile, ekzemple promenante, aŭ survoje el laboro k.t.p., konsideri, kion ni faru en tiu aŭ alia situacio, kiun metodon de la batalo ni elektu k.s.

Defendanto per sia agado decidas certgrade pri kondiĉoj, en kiuj konflikto ekestas. Per sia prudento kaj antaŭvido li povas kaŭzi, ke li solvas la situacion relative facile aŭ evi-

(+) (el la p.6) La okazaj armiloj estas speco de la t.n. okazaj rimedoj, vidu la ĉapitrojn 1.5 kaj 1.6.

tas ĝin. Lia facilanimeco ja povas kaŭzi ankaŭ la malon.

El la vidpunkto de studado de la sindefendo oni dividas la konfliktajn situaciojn en la sindefendajn, sinprotektajn kaj en la disputajn laŭ tio, ĉu la kolizio de la celoj oni solvas uzante perforton, repaciĝon aŭ la vojon de pruvo. Praktike kaj etike estas ĝuste procedi tiamaniere, ke oni antaŭ ĉio provu, ĉu estas aplikebla la vojo de pruvo (disputa situacio). Se oni ne sukcesis, ekestas la sinprotekto- aŭ la sindefendo-situacio.

### 1.5. Kiel eviti batalon?

Evito de batalo estas plejparte nur eufemisma termino por ordinara fuĝo. Sed kuri scias ankaŭ atakanto. Sekve de tio, por ke estu la forkuro sukcesa, la atakanto devas esti aŭ malpli rapida, aŭ iamaniere handikapita. Al nia rapideco ni ne tre fidu. Tial interesas nin, kiel estas eble la atakanton por momento paralizi kaj malebligi al li tujan persekutadon. Ĉi-cele estas aplikeblaj ekzemple la t.n. specialaj aŭ okazaj rimedoj.

Inter tre efikajn rimedojn apartenas eĉ ordinara infana pistoleteto (speciala rimedo), en kiu estas akvo. Ĉi tiun akvon oni ŝprucu neatendite en la vizaĝon de kontraŭulo. Tio la atakanton plejofte tiomgrade perpleksigas, ke li ne kapablas en momenta paralizo agi, kaj la defendanto gajnas tempon por pli facile fuĝi. Estas aĉeteblaj ankaŭ diversaj specialaj rimedoj de tiu ĉi speco. En mizero helpas nin ankaŭ manpleno da koto, sablo k.t.p.

Se la pistoleteto estas plenigita per likvaĵo, kiu povas atakanton por longa tempo marki, ekzemple per neforigebla farbo aŭ abomena feto, la situacio estas por la defendanto - en certa grado - ankoraŭ pli facila. Vorta minaco kune kun timo al kaptiĝo ĉe multaj homoj forte efikas kaj malinklines ilin de malindaj intencoj.

La atakanto estas forpelebla ankaŭ per iu son-fonto. Se iu aparato komencas en silenta strateto aŭdigi sonon fortan 110 decibelojn, la atakanto ordinare ektimas kaj forkuras. Tamen tiuj ĉi du lastaj rimedoj ne ĉiam havas atenditan efikon. Se la atakanto estas tiomgrade malinteligenta aŭ ebria, ke por li ne tre gravas, ĉu li estos kaptita aŭ ne, li povas daŭrigi sian agadon senatente al la ekfunkciigo de la alarmilo aŭ senkonsidere al sia eventuala markiteco.

### 1.6. Okazaj rimedoj

Kion oni komprenu sub la vorto okaza rimedo? Esence ĉion, kio estas aplikebla por sendangerigi kontraŭulon kaj kio hazarde troviĝas ĉemane. Se oni iras ekzemple tra arbaro, tio estas ŝtono, branco, bastono, en parko forrompita vergo, en ĉambro seĝo, tablo-kruuro, botelo k.t.p. Memkomprene estas necese scii, kiamaniere apliki similajn rimedojn laŭeble plej efike. Tion ni nun koncize

Sekcio Wiesław Rózanowski. Sekvis salutparoloj de IFEF-prezidanto Joachim Giessner kaj oficialaj gestoj, inter ili reprezentantoj de la menciitaj eksterlandaj fervojistaj sekcioj.

Post paŭzo okazis labora parto de la kongreso, dum kiu polaj kolegoj pritraktis tutjaren agadon kaj agadplanon por venonta jaro. En ĝi elstaran lokon okupas preparoj de la venonta IFEF-kongreso, kiu en la jubilea jaro de Esperanto okazos en Katowice. La fervojista grupo en Katowice, kvankam fondita nur antaŭ unu jaro, jam sukcese kaj fervore laboras por sukcese plenumi tiun gravan taskon.

La eksterlangaj gestoj dum la labora kunsido partoprenis komunan promenon tra arbara ĉirkaŭaĵo de la kongresejo.

Post bona komuna tagmanĝo okazis kultura programo. La plej grandan intereson guis konkurso - turniro de la trimembraj grupoj, konsistantaj el reprezentantoj de la fervojistaj kluboj el Bydgoszcz, Katowice, Tarnowskie Góry kaj Wrocław por transirpokalo, en kiu venkis teamo el Tarnowskie Góry.

Sekvis informoj pri la lasta 38a IFEF-kongreso en Skopje kun diapozitivaj, dum kiuj partoprenintoj revivigis multajn rememorojn pri la belaj dumkongresaj travivaĵoj, aliaj interkonatiĝis iomete kun solena etoso de nia lasta IFEF-kongreso.

Post komuna vespermanĝo ni kun guc partoprenis la kongresan balon. Kun akompano de la fervojista muzikkvarteto el Tarnowskie Góry kaj sub lerta gvidado de koleginino Henryka Berkowska-Szmatloch ni multe dancis, kantis kaj amuziĝis ĝis noktomezo.

Dimanĉe okazis komuna ekskurso per motortrajno al urbo Ĉenstoŭovo. Ĉenstoŭovo /Czestochowa/ estas vojevodia centro de kulturo kaj regiona turismo, ĝi troviĝas ĉe rivero Wisła sur la vojo inter Varsovio kaj Katowice. Sur teritorio de Ĉenstoŭova vojevodio troviĝas pitoreskaj kalkŝtonaj altaĵoj farantaj unikan, valoran pejzaĝon. Tie en XIV. jc. reĝo Kazimierz Wielki konstruis kastelojn por defendo de regiono Malopolska /Malgrandpola/. Nun ĝiaj ruinoj troviĝas en Mirów, Bobolice kaj aliaj lokoj, kreas interesege turistojn nomatan "Vojo de Aglaj Nestoj".

Unua historia mencio pri Ĉenstoŭovo devenas de XI. jarcento en dokumento de krakova episkopo. Urbajn rajtojn ricevis kavalira vilaĝo en 1377 j. de opola princo Władysław. Grava por estonto de Ĉenstoŭovo estis alveno en jaro 1382 el hungara Buda de monaĥoj Paŭlinoj, kiuj ekloĝis sur Hela Monto. En la sama jaro en klostro preĝejo oni lokigis Miraklan Bildon de Nigra Madono. Rapidege disvolvigis ĝia kulto kaj al Ĉenstoŭovo multnombro venadis pilgrimantoj. Ni trairis ĉefan arterion de la urbo, aleon Plejŝanktulino Maria, kiu kondukis nin al klostro de Paŭlinoj sur Hela Monto kaj religia komplekso troviĝanta tie.

Fortikaĵo sur Hela Monto estas fama pro la defendo kontraŭ Svedoj en 1655j. Tiam prioro de Paŭlinoj Augustyn Kordecki heroe kaj sukcese batalis kun siaj defendantoj. Ankaŭ en 1770 j. generalo Kazimierz Pulaski kun siaj patriotoj sukcese batalis kontraŭ caraĵ soldatoj. En 1908 j. helmonta fortikaĵo sukcese haltigis atakojn de aŭstria armeo. Pro ordono de caro Aleksandro I oni detruis defendmurojn kaj ruinigis ilin en 1913, sed oni rekonstruis ilin en 1943j.

Ni kun intereso trarigardis krom konata baziliko konstantan ekspozicion "Kavalira halo" kaj tre riĉan klostran trezorejon /Skarbiec/.

Sed Ĉenstoŭovo ne estas nur pilgrimloko. Pri hodiaŭa vivo kaj disvolvigo de la urbo decidas la plej granda uzino Bolesław Bierut. Urbo posedas ankaŭ industrion tekstilan, kemian, konsumprodukta. Oni intensive konstruas novajn loĝkvartalojn. Ĉenstoŭovo estas gra-

va centro de scienco kaj kulturo, Trovigas tie Politekniko kaj Pedagogia Altlernejo, Teatro kaj Filharmonio, Distrikta Muzeo, kinejoj kaj kulturdomoj. Hodiaŭan Ĉenstoŝovon kun 230 miloj da loĝantoj vizitas ĉiujare kelkaj milionoj da pilgrimantoj kaj turistoj.

Kontentaj kaj kun multaj rememoroj forveturadis dimanĉe partoprenantoj de la kongreso al siaj hejmlokoj. Kun dankvortoj al niaj polaj kolegoj pri la bone preparita kongreso kaj kun deziro nepre partopreni venontjaran 39an IFEF-kongreson, kiu okazos en tagoj de 16a ĝis 22a de majo 1987 en Katowice. Ĝi estos la unua IFEF-kongreso organizata en Pollando ĝuste en la jubilea centjaro de Esperanto. Seriozaj intencantoj partopreni la Kongreson povas ricevi pli detalajn informojn skribante al Fervojistaj Sekcio ĈEA, Jilská 10, 11000 Praha 1 aŭ rekte al konstanta adreso: 39a IFEF-Kongreso, Slaska DOKP, Al. Rożdzienskiego 1, PL 40-202, Katowice, Pollando.

Jindřich Tomíšek



Reprezentanto de FS ĈEA post salutparolado dum solena inaŭguro transdonas simolan donaceton al prezidanto de pola FS Wiesław Rózekiewicz



Partoprenantoj de la kongreso de polaj fervojistoj dum la komuna fotado

# Efektive okazis

## Esperanto savis min

Mi volus rememori jaron 1963, kiam mi partoprenis UEA kongreson en Sofio. Ĝi estis mia unua kongreso, sed samtempe mia unua vojaĝo en Bulgarijon.

Pri impresoj de la kongreso mi ĉi tie ne volas rakonti, kvankam estis por mi tre kortuŝa ekkono, ke per unu sola lingvo povas tiel bone interkompreniĝi kelkaj miloj da homoj el 48 landoj.

Ĝaudon, la tagon de ekskursoj, mi volis eluzi por la vizito de Nigra maro, kiun mi ankoraŭ ne vidis. Kun semideano Jan mi aĉetis flugbiletojn al Varna kun informo, ke revenajn biletojn ni povos aĉeti en flughaveno Varna. Ni ne havis tro da mono, ĉi sufiĉis nur por la vojaĝo kaj eble por 2-3 limogadoj. Por ni ambaŭ estis pli grave unuaforte vidi la maron, ol suferi sen manĝaĵo la tutan tagon. Ni bone alteriĝis al Varna kaj de tie buse al Oraj Sabloj. La buso estis plenplena de homoj, ni staris en ĝia angulo ĉe juna bulgaro. Post momento ni ekbabilis kun li iomete ruse kaj slovake. Li estis tre afabla kaj proponis akompani nin al la plaĝo kaj montri ĉion bezonan. Parolinte ankaŭ pri si, poste li demandis, ĉu ni hazarde ne havas iom da ĉeĥoslovaka mono. Post du monatoj li vojaĝos al Slovakio kun sia dancgrupo kaj ilia poŝmono estos tro malgranda.

Hazarde mi havis ĉe mi 100 Kĉs. Vi ne povas imagi, kiel la bulgara belulo superŝutis nin per ĉio ebla. Li konstatis, ke ni ne povas mendi al ni tagmanĝon, nehavante sufiĉe da levoj, do li subite alportis amason da fruktoj, panetojn kaj por vespero invitis nin en hotelon Ĉajka al riĉa vespermanĝo kun aperitivo.

La forflugo de aviadilo estis planita por 24-a horo, por kiu ni povis aĉeti flugbiletojn kaj nia nova bulgara amiko akompanis nin al flughaveno. La tutan tagon ni fartis bonege kaj estis feliĉaj ankaŭ pro belega naĝado en la varma maro.

En aviadilon ni eksidis vere lacaj. La tempo de starto jam pasis, sed io okazis. Ni aŭdis laŭtan voĉon de stevardino. Bulgare ni ne komprenis, tamen kelkajn vortojn ni kaptis. Jan trerigardis niajn flugbiletojn kaj subite konstatis, ke mia bileto havas stampoŝon de plua tago. Tia eraro de la oficistino ĉe la ĝiketo! La stevardino jam komencis trerigardi biletojn de ĉiuj pasaĝeroj. Ĉu ŝi devigos min forlasi aviadilon- nun dum noktomezo? Jan flustris al mi: "Klopodu ne kompreni, parolu nur Esperante!" Kaj stevardino jam staris ĉe mi. "Kontrolo de flugbiletoj". Tenante bileton en la mano mi transdonis ĝin kaj ŝi tuj ekvidis la daton. Kio ajn ŝi diris al mi, ĉiam mi rapide respondis esperantlingve: "Kion Vi volas de mi? Flugbiletojn mi havas. Mi ne komprenas al vi!" Kelkfoje mi tion ripetis.

Dank' al dio, ke ŝi ne demandis, de kiu lando mi estas kaj ŝi ne volis vidi pasparton, ĉar certe iu troviĝus en la aviadilo, kiu povus klarigi al mi la aferon almenaŭ slovake, ke mi devus kompreni. Pluajn pasaĝerojn ŝi jam ne kontrolis, sed Jan aŭdis, ke stevardino petis bulgaron, kiu jam ne trovis sidlokon, ke li vojaĝu per matena aviadilo enstataŭ mi, ke la virino estas eksterlandano kaj ŝi tute ne komprenas.

(fino sur paĝo 21/

## RECENZOJ de ADOLF STAŬURA

Canko Murgin: PROGRESEMAJ MOMENTOJ EN LA IDEOLOGIO L.L. ZAMENHOF. Kolekto de studoj. Eldonis Bulgara Esperantista Asocio, Sofio, 1985. Formato 20,5 x 14,5 cm, 66 paĝoj.

La aŭtoro priskribas malfacilajn komencojn de eldonado de la monata gazeto "La Esperantisto" en la jaroj 1889-1895, kiu estis la unua Esperanta periodaĵo. Poste li transiras al la "interna ideo" de esperantismo kaj konstatas, ke ĝi estas "speco de ideologio en Esperanto-movado dum la komencaj 18 jaroj" /p.11/ kaj konkludas, ke "Zamenhof atribuis al la interna ideo efikon de panaceo kontraŭ la sociaj difektoj de kapitalismo" /sampaĝe/. Sed proksime al tio Canko Murgin konstatas, ke la "interna ideo" naskiĝis jam en decembro 1878, kiam 18jara Zamenhof festis kreon de sia "lingve universala" kun grupeto da diversnaciaj samklasanoj en sia hejmo kaj ili kantis, ke malamikeco de nacioj devas fali kaj homaro devas unuigi sin en unu familion. Tio do esprimas la idealon, ke la homaro vivu en paco.

Poste Canko Murgin citas multloke fragmentojn el poemoj kaj diversokazaj paroladoj de Zamenhof, liajn vortojn pri amikeco inter nacioj, pri rompado kaj falo de muroj inter ili ktp. Multe da loko estas dediĉita al la "religioj" de Zamenhof - hilelismo kaj homaranismo. Fine Zamenhof diris, ke la interna ideo kaj homaranismo ne estas identaj, tamen ili estas tre parencaj.

Sur p. 58 oni legas: "...Zamenhof pentris la bildon de la estonta socio sub la inspira influo ke komunismaj ideologoj Karlo Marks kaj Frederiko Engels."

Restas nenegebla la fakto, ke Zamenhof sopiris pri vivo en paco kaj feliĉo de ĉiuj homoj, kaj tion oni vere devas alte aprezi. Canko Murgin havas la meriton, ke li kolektis ĉiujn tiujn pensojn en unu libro.

Ce la fino de la libro estas aldonitaj biografioj pri Alfred Thonney el Lozano, pri hispano Julio Mangada Rosenörn kaj pri Felikso Zamenhof, frato de nia Majstro. Ili ĉiuj apogadis la ideojn de L. L. Zamenhof pri pli bona ordo de la tuta homa socio, Felikso verkedis ankaŭ poemojn en tiu senco.

La libro estas ofsete presita laŭ tajpaĵo. Klopodante havi ĉiam rektlinian margenon, la tajpinto iam kurioze dividis la vortojn, ekz. jam sur la unua linio p. 3 oni vidas Zamenh- kaj sur la dua linio of. Simile sampaĝe kontr-ibuoĵ,Rys-zard, artikolo-jn ktp. Tio tamen ne forigas la fakton, ke la margenoj ne estas rektliniaj, sed iom "kombilaj". Plu iom ĝenas uzado de ŭ anstataŭ ŭ.

La lingvo ne estas tute senripoĉa, ekz. sur p. 6 oni legas "eldonanto" anstataŭ "eldonado", plurfoje oni legas pri la gazeto "la Esperantisto" anstataŭ la ĝusta "La Esperantisto" kaj simile. Sur p. 9 oni legas pri "eksploatado de homo kontraŭ la homo", pli bone certe estus "fare de" aŭ "far" anstataŭ kontraŭ kaj la artikolo "la" ne konvenas. Sur p. 58 estas ellasita la akuzativa -n, ĉar oni legas: ...la fabla enigmo pri "rompado de la muroj" Zamenhof mem tre precize deĉifris/anstataŭ "fablan enigmon"/.Mi ne indikas ĉiujn neperfektaĵojn.

Generale la libro estas utila kaj oni povas el ĝi multe ĉerpi en tiu senco, ke d-ro Zamenhof estis ne "nur lingvisto", sed ankaŭ pensulo pri pli bona vivado de ĉiuj homoj sur la tero. Jed pli ol 200 jarojn antaŭ li skribis nia Jan Ámos Komenský /Comenius, Esperante Komenio/ pri scienca regado super la tuta mondo, por ke ĉiuj homoj povu bone vivi. Kaj kion ni havas anstataŭe?

La verko de Canko Murgin estas bona argumento kontraŭ tiuj homoj, kiuj vidas en Esperanto nur ian elpensaĵon, sen idea graveco por nia socialisma socio kaj sen troa utilo por homoj, uzantaj ĝin.

Henryk Sienkiewicz: NOVELOJ. El la pola tradukis Lidia Zamenhof. Eldonis RITMO, eldonkleriga centro, Varsovio 1985. 65 paĝoj, form. 12 x 18 cm, kortonita.

---

Tiu ĉi kolekto de noveloj aperis jam en la j. 1925 ĉe Ferdinand Hirt & Sohn en Lepsiko. Andrzej Pettyn verkis al ĝi enkondukon, rakontante pri verkoj de Sienkiewicz tradukitaj en Esperanton, ankaŭ pri liaj aliaj gravaj verkoj netradukitaj, kaj pri sorto de la postmortaj restaĵoj de la aŭtoro, mortinta en Svislando. Ankaŭ la tradukintino, subskribita "Lidja", rakontas unue pri la fama Nobel-premiito kaj karakterizas liajn verkojn, al esperantistoj jam konataj. Poste sekvas kvin noveloj, kiuj estas vere legendaj. La aŭtoro priskribas malfeliĉan mortadon de malriĉa skulptisto, poste sekvas novelo pri vivo kaj konduto de maljuna bienservisto. La tria historieto okazas en helena Ateno verŝajne en la 4-a jarcento antaŭ nia erao kaj ĝi estas iom ŝanĝita mito pri la skatoleto de Pandora. La kvara estas hinda legendo pri Kriŝno kaj lotuso kaj la kvina rakontas pri malfeliĉa sorto de dekjara vilaga orfino. Ĉio estas tre interese kaj atentokapte prezentita kaj pravas la altan nivelon de la aŭtoro.

La lingvaĵon de la malfeliĉa Lidja oni devas preni de tiu vidpunkto, ke ŝi tradukadis antaŭ pli ol 60 jaroj. Nun oni esprimus tute alimaniere multajn aferojn. Ekzemple sur p. 19 estas en kvin linioj sepfoje uzita -ad-, laŭ la nuna vidpunkto oni pli konvene esprimus tion per kompleksaj verboj /estas -anta ks./. Neniam ŝi uzas la laŭ mi neĝustan "nomiĝi" /mi dirus "nomiti"/, ŝi skribas "esti nomata Nikolao" /p.24/, "kiel ĝi estis nomata?" /p.29/ ktp. Sur p. 28 kaj 30 oni legas "Varŝavo", sur p. 26 kaj pluaj estas "pistonoj", en PIV kaj aliaj vortaroj netroveblaj, simile "bengaloj" sur p. 51, "heterinoj" sur p. 45 /eble hetajroj?/. La esprimado estas iam stranga: p. 13: "eltiriginte el la lito", samloke "La fenestro de la laborejo eniris en korton", iuj propraj nomoj estas nun alifforme uzataj ktp. Tial la libro vere ne povas esti rekomendata al novaj esperantistoj.

Oni eble eldonis ĝin por honorigi la duoblan datrevenon de Sienkiewicz /1846-1916/. Estus tre konvene prezenti biografieton de la tradukintino Lidja Zamenhof, kiu tiel malfeliĉe perdis sian vivon dum la faŝista teroro en Varsovio, kaj se oni estus aldonita klarigojn ĉe diferencoj, kompare al la nuntempa esprimado en Esperante, la libro certe konvenus por pli granda rondo de legantoj.



Masaji Iwakura: LA TAGO DE SENAERIGO. Tradukis Sejŝro Nomra, ilustris f-ino Joŝiko Ueda. Eldonis Biblioteko Kolombo, Numazu, Japanio. 87 p., 13 x 18 cm, kartonita.

---

La libreto enhavas antaŭparolon "Antaŭ iom longa tempo" kaj du rakontojn pri vivo en japana vilaĝo. Aldonitaj estas foto de la aŭtoro, lia koncize biografio kaj postparoloj: Vortoj de la aŭtoro kaj Notoj de la tradukinto.

La unua rakonto, laŭ kiu la libreto estas nomita, priskribas maltrankvilajn juliajn tagojn en la j. 1910, kiam diskonatiĝis la famo, ke je certa tago la aero forflugos de la terglobo kaj dum 5 minutoj, dum kiuj homoj ne povos spiri, ili ĉiuj mortos. Unusola helpo estos, havigi al si provizon da aero en kaŭĉukaj sakoj aŭ en biciklaj aertuboj. Sed la prezoj de tiuj objektoj terure altiĝis kaj kion ĉion la vilaĝanoj kaj instruistoj aranĝis por savi sin, tamen fine rezigne atendante la morton, pri tio estas interese legi. Temas pri la tago, kiam - kiel oni rakontis tiam en nia lando - nia terglobo enpenetros la voston de la Halley-kometo kaj ĉio pereos.

En la dua rakonto, duoble pli longe ol la unua, oni legas pri malagrablaĵoj, kiujn suferas patrino, kies filo malsaniĝis je neŭrastenio. Li suferas de grandaj fobioj pro diversaj aferoj ĉu parte efektivaj, ĉu nur imagataj, serĉas helpon en libro pri sorĉado, sed tiu tute trompas lin, ĝis fine lia patrino tamen trovas vortojn, per kiuj ŝi tranviliĝas sian malfeliĉan bubon.

En postparolo la aŭtoro /nask. 1903/ diras interalie: "Cetere mi, aŭtoro, kiu ja sendube apartenas al homoj tiel nesentemaj, devas konfesi, ke nun mi mem efektive fariĝas "bubo ĉiam maltrankvila" ne malpli ol tiu en la rakonto... efektive minace staras tuj antaŭ nia nazo la grava danĝero, por kiu ni riskas la vivojn de la terglobo kaj nia homaro... Por mi, unu el japanoj, kiuj travivis la suferon de inferoj en Hiroŝima kaj Nagasaki, la afero estas brule urĝa problemo. Tiuj, kiuj kun moko prenos tion por paranojo, ja devas esti, se ne diabloj, nur malmultaj maniuloj pri nuklea armilaro, ensorĉitaj de diabloj..."

En la libro estas pluraj lokoj gramatike korektindaj. Mi ne komprenas, kion la aŭtoro volas diri sur p. 4: "...de branĉo de granda kriptomerio tebolilego pendiĝis malsupren..." La vorton "kriptomerio" /speco de arbo/ mi trovis nur en Enciklopedieto japana, sed mi ne scias, kio estas "tebolilego".

La ilustraĵoj estas siaspece belgustaj, nur ŝajnas al mi iom stranga, ke sur ĉiu vizaĝo mi vidas brovojn kaj okulojn longaj ĝis oreloj.

---

ANTOLOGIO DE PORTUGALAJ RAKONTOJ. Kompilita de Manuel de Seabra. Eldonis Grupo de Admirantoj de Zamenhof, Lisboa 1959. 220 p., 12 x 19 cm.

---

En la antaŭparolo diras la kompilinto: "Literaturo estas la spegulo de l' popoloj". Kaj pretiginte tian spegulon, li prezentas al ni selektitajn verkojn de 14 portugalaĵ geverkistoj /du virinoj/, po unu rakonto de ĉiu.

El la aŭtoroj apartenas ses al la novrealisma skolo. El iliaj rakontoj nur du estas vere drastaj kaj unu rakontas pri malfeliĉa akcidento en ŝakto. La aliaj historietoj priskribas ekzemple noktan aventuron de ŝtata oficisto, kies kvalifiko kaj labormoralo estas minimumaj, kaj li savas prostituitinon. Kelkaj rakontoj prezentas

al legantoj historietojn de homoj, vivantaj en misero. Ankaŭ oni legas pri puberulo, alportanta hejmen vesperton kaj ellasanta ĝin antaŭ gegastoj de siaj gepatroj. Neceseja gardistino batalas pri pli bona vivo de sia filo kaj kiam ŝi sukcesas trovi por li konvenan postenon, ŝi ĝisvivas konsternen trompon fare de li. Oni legas pri afrikanino, kiu eksterleĝe venas Usonon per kargoŝipo kaj tie ricevas neesperitan Kristnaskan donacon de policano. Samba estas nigra afrikanino, kiun neniu aĉetis ĉe sklavovendado kaj ŝia vivo tial finiĝas pere. Ankoraŭ unu rakonto prezentas oldan grizharan kaj grizbarban nigrulon, kiu devas pene laborgajni sian ekzistadminimumon kaj mizere mortas. Escepta estas historieto pri vivo de koko. Nu, tiu certe ne estas nur portugaleska. La rakontoj de la du virinaj aŭtorinoj priskribas familiajn interpersonajn rilatojn.

La rakontojn esperantigis ok tradukintoj. Oni povas dividi ilin je du grupoj: unuj uzas nenecese kompleksajn verboformojn /estas - anta ks./, ĉe aliaj tia uzado ne ekzistas kaj tio estas por ili pluso. Sed ĝenerale ne eblas diri, ke la lingvo estas senriproĉa almenaŭ ĉe unu aŭtoro. Ofte oni trovas uzadon de "alie" en la senco "aliloke", eĉ "alien" /aliloken/, "tie kaj alie", "aliam", ankaŭ "iulo, tiulo", kiuj ne estas gramatike pravigeblaj. Iam ĝenas la uzado de prepozicio "je", kiam oni povus uzi pli konkretan prepozicion: "Je la fino de la muro" - "ĉe la fino...", "Regionoj apudaj je la Grandaj lagoj" - "Kial ne "al" anstataŭ "je" /p.81/ aŭ "Regionoj apud la..." Pri iuj aferoj oni devas miri. Kion signifas "Mia oficejo estas la stolejo" /p.15/? Sur p. 85 aperas "juninoj", sed ankaŭ "junulinoj". En la lasta rakonto estas almenaŭ naŭfoje uzita la vorto "maljunino", kvankam "maljunulo" ankaŭ unufoje aperas. Kaj mi povus citi plu aliajn gramatikajn kaj stilajn malglatadojn.

La almetita folieto "Bonvolu korekti" enhavas nur 9 preserojn, sed en efektiveco estas pli multe da ili. Se ne estus tiom da malperfektaĵoj, la legado de la libro estus multe pli atentokapta, ĉar pli granda nombro de historietoj estas vere interesaj.

Eduardo Novembro: ETAJ RAKONTOJ. Eldonis Portugala Esperanto-Asocio, Lisbono, 1984. Kovrilon desegnis O.J.R. Crispim, 127 p., 12x17 cm.

La libreto enhavas 16 rakontojn, el kiuj 15 la aŭtoro verkis en la portugala lingvo kaj mem tradukis, la lasta estas verkita originale en E.

La rakontoj priskribas krizajn momentojn en vivo de homoj. En la unua, "La morto de l' artisto" estas sur kvar paĝoj tiom da eventoj, ke el ili povus esti kreita romano. Nu, la aŭtoro kontentigis pri nura konstato de multaj faktoj el vivo de pentristo, kies ekzistado abrupte suprenleviĝas kaj finiĝas en misero. En la dua historieto viro perdas edzinon, kiun li antaŭe delogis, eĉ sian infanon. "Kortuŝa ploro de infano" rakontas pri orfa knabeto, mizere surstrate vivanta, kiun savas simile mizera oldulo. En "Karnavala trompo" honesta junulino lasas forlogi sin en domon, en kiun ŝi neniam estus enirinta. Plu ni povas legi pri ŝtelisto, pri infano per aŭto faligita, pri kalkulficisto vane serĉanta pli bonan postenon-ĉi tie scias la aŭtoro ironii, pri analfabeta laboristo veninta en urbon el vilaĝo eĉ kum edzino kaj infano kaj vane esperinta trovi en urbo pli bonan vivon, ktp. La plej drasta estas "-La juĝato, leviĝu!" La fina rakonto estas sciencfikcia kaj ni sciigas, kiel nia

ĈAPITROJ PRI LA SINDEFENDO

© Ing. Ivan Špička kaj Ing. Jindřich Novák

fika aŭ eĉ senefika. En tiu ĉi libro oni konatiĝos kun kelkaj praktikoj, kiujn ni ankoraŭ ne kalkulas en la mensan sinpreparon, sed kiuj malgraŭ tio povas - taŭge aplikitaj - la mensan staton de la batalanto ege plibonigi.

1.4. Kiam ni batalos?

Ni imagu sinjoron X, kiu iras vespere hejmen tra iu nemulte prilumita kaj preskaŭ forlasita strato. Estas agrabla antaŭvespero, sinjoro X pensas pri bona vespermanĝo kaj memkomprene atendas nenion malbonan. Subite li estas haltigita de nekonata viro, kiu petas fajron por sia cigaredo. Plue, sinjoro X memoras nenion. En malsanulejo li estas informita, ke li estis insidatakita, frapita sur la kapon kaj prirabita. La paciento iom post iom rememoras la okazintaĵojn de tiu vespero, sed detalojn li revokas malrapide kaj ĝene.

Tamen la situacio povis evolui ankaŭ alie. Sinjoro X ekzemple ekrimarkis, ke li estas sekvata de nekonata viro, kiu paŝo post paŝo pliproksimiĝas. En la momento, kiam la nekonatulo atingis lin, sinjoro X turniĝis. La atakanto, ni jam povas nomi lin tiel, kaptis la sinjoron X krude je la kolomo kaj postulis monon. Poste la sinjoron X, kiu havis ĉe si nur dek kronojn, la seniluziigita atakanto kolerege per pugno surterigis.

Estas ankaŭ eble, ke sinjoro X estas haltigita en parko fare de grupo de junuloj. Ili unue ĝenas kaj ofendas lin. Fine li estas bategata nur por amuziĝo de la atakantoj.

Ni pensu nun pri la tri menciitaj ekzemploj de naskigo de la sindefendo-situacio. Kion povis fari sinjoro X? Kie li faris eraron? Ekesto de la sindefendo-situacio estas la unua kaj ni diru rekte ofte la plej decida fazo de la tuta batalo. Unu el la plej gravaj postuloj de la monosignala sindefendo tekstas: la defendanto devas per sia kondukado ĉiam konservi sufiĉan tempon por prepari sin al la batalo (pri tio temas la t.n. produktado de la sindefendo-situacio). Ĝi, kromalie, rezultas el la postulato menciita sur la paĝo 4. Tial la sinjoro X, revenante hejmen tra malluma strato, ne permesu al nekonata homo pliproksimiĝi. La truko kun peto pri fajro por cigaredo estas cetere tiom antikva, ke sole tre neiva homo povas konsideri ĝin serioze. Ankaŭ en la okazoj, kiam nekonatulo demandas nin nokte en flankensitua loko pri la vojo, klopodas ekinterparoli k.t.p., ni ĉiam tenu almenaŭ tian distancon for de li, ke li ne povu ekataki sen antaŭa elpaŝo. Tamen pri sekura distanco ni zorgu ankaŭ aliokaze. Ni ekzemple neniam iru hejmen tre proksime preter dikaj arboj, malantaŭ kiuj povus kaŝi sin atakanto, ni

evitu ankaŭ domajn veturtrapasejojn, murojn, de sur kiuj iu povas salti sur nin aŭ ĵeti ion k.t.p. Se estas eble, ni iru meze de strato aŭ sur la rando de trotuaro. Tiel ni havas relative sufiĉe da tempo por prepari nin al eventuala batalo. Se ni iras tra voĵparto, kiun ni taksas danĝera kaj se ni ne povas eviti ĝin, ni antaŭripensu, kion ni estus farontaj okaze de subita atako. Reala danĝero minacas plej-ofte ekde la momento, kiam ni rimarkas homon, kiun ni evidente interresas. Do, se iu sekvas nin kaj se ni ne plu povas fuĝi, ni elserĉu iun okazan armilon (ŝtonon, bastonon,...)(+), turnu al la kontraŭulo nian frunton kaj ekbatalu. Pri tio ni ankoraŭ skribos. Se ni vidas, ke sur nia vojo troviĝas ebria grupo, ni preferu, laŭeble, eviti ĝin. Decido, ĉu eviti sindefendo-situacion aŭ prepari sin al batalo, dependas memkomprene de tio, kion ni volas riski kaj kion ni scipovas. Tamen certe estas pli bone iom skeptiki pri niaj scioj kaj scipovoj ol trotaksi ilin.

En la sindefendo-situacion povas disvolviĝi ankaŭ interparolo, trapasinta ĝis kverelo. Ni povas esti atakitaj vorte pro iu reala aŭ konkreta kulpo. Kiel agi ĉi-okaze? Kiel sekurigi, ke la situacio ne transpasos en la sindefendan? Se ni vidas, ke nia oponento ne kapablas pensi kaj agi racie kaj sen antaŭjuĝoj, estas sencele daŭrigi la interparolon. Ni ĝin simple finu. Memkomprene ni klopodu, ke nia agado ne estu ofenda. Se ni kulpigas per ia kulpeto aŭ se ni farus ion, kion alia persono taksas malplaĉe kaj se ni volus la konfliktan situacion transformi al ordinara vivsituacio, estas plej laŭcele peti ĝentile pardonon. La plimulto de homoj ne kapablas tiuokaze daŭrigi la kverelon. Kaj evidente ankaŭ tiam ofte estas pli bone foriri. Se ni vidas, ke iu homo volas kvereli, ni ignoru lin kaj se estas eble, ni foriru.

Al iuj legantoj tiuj ĉi konsiloj eble ne plaĉas. Ili preferus frakasi oponenton en vorta duelo. Tio ankaŭ eblas. Tamen tio supozas grandan arton, kiu certe ne estas facila. Ĝi postulas multe da scioj, grandan pretecon, totalan trankvilon kaj fine necesan praktikon. Ĉiam minacas ebleco, ke la oponento ne paciĝos post sia vorta malvenko kaj klopodos solvi la situacion uzante perforton. Tiuokaze komenciĝos la sindefendo-situacio.

Cu nia ekscitita oponento ofendas nin? Ni demandu alie: ĉu oni povas konsideri vortojn de primitivulo kiel ofendon? Se iu taksas kiel sufiĉan motivon por apliki pezan frapon la vortan konflikton aŭ diferencon inter opinioj, li stariĝas sur la nivelo de sia oponento kaj nia libro ne estas destinita por li. La taksado de nia agado fare de homo, kiu ne scias ĝustan solvon de la situacio, ne interresas nin. La plej grandaj venkoj ordinare ne estas videblaj por ĉiu. Se temas nur pri la t.n. ofendoj, ni cedu ĉiam, kiam konflikta situacio, ofte pro nia mallerteco, progresis ĝis tiu ĉi punkto.

Ni montris sur la ekzemploj la komencon de kelkaj sindefendo-situacioj. La praktikon pri la produktado kaj transigo de unu tipo de situacio en alian tamen devas ĉiu akiri enkadre de la reduktita kurso mem. Estas tre utile, ekzemple promenante, aŭ survoje el laboro k.t.p., konsideri, kion ni faru en tiu aŭ alia situacio, kiun metodon de la batalo ni elektu k.s.

Defendanto per sia agado decidas certgrade pri kondiĉoj, en kiuj konflikto ekestas. Per sia prudento kaj antaŭvido li povas kaŭzi, ke li solvas la situacion relative facile aŭ evi-

(+) (el la p.6) La okazaj armiloj estas speco de la t.n. okazaj rimedoj, vidu la ĉapitrojn 1.5 kaj 1.6.

tas ĝin. Lia facilanimeco ja povas kaŭzi ankaŭ la malon.

El la vidpunkto de studado de la sindefendo oni dividas la konfliktajn situaciojn en la sindefendajn, sinprotektajn kaj en la disputajn laŭ tio, ĉu la kolizio de la celoj oni solvas uzante perforton, repaciĝon aŭ la vojon de pruvo. Praktike kaj etike estas ĝuste procedi tiamaniere, ke oni antaŭ ĉio provu, ĉu estas aplikebla la vojo de pruvo (disputa situacio). Se oni ne sukcesis, ekestas la sinprotekto- aŭ la sindefendo-situacio.

### 1.5. Kiel eviti batalon?

Evito de batalo estas plejparte nur eufemisma termino por ordinara fuĝo. Sed kuri scias ankaŭ atakanto. Sekve de tio, por ke estu la forkuro sukcesa, la atakanto devas esti aŭ malpli rapida, aŭ iamaniere handikapita. Al nia rapideco ni ne tre fidu. Tial interesas nin, kiel estas eble la atakanton por momento paralizi kaj malebligi al li tujan persekutadon. Ĉi-cele estas aplikeblaj ekzemple la t.n. specialaj aŭ okazaj rimedoj.

Inter tre efikajn rimedojn apartenas eĉ ordinara infana pistolet (speciala rimedo), en kiu estas akvo. Ĉi tiun akvon oni ŝprucu ne atendite en la vizagon de kontraŭulo. Tio la atakanton plejofte tiomgrade perpleksigas, ke li ne kapablas en momenta paralizo agi, kaj la defendanto gajnas tempon por pli facile fuĝi. Estas aĉeteblaj ankaŭ diversaj specialaj rimedoj de tiu ĉi speco. En mizero helpas nin ankaŭ manpleno da koto, sablo k.t.p.

Se la pistolet estas plenigita per likvaĵo, kiu povas atakanton por longa tempo marki, ekzemple per neforigebla farbo aŭ abomena fetoro, la situacio estas por la defendanto - en certa grado - ankoraŭ pli facila. Vorta minaco kune kun timo al kaptiĝo ĉe multaj homoj forte efikas kaj malinklinas ilin de malindaj intencoj.

La atakanto estas forpelebla ankaŭ per iu son-fonto. Se iu aparato komencas en silenta strateto aŭdigi sonon fortan 110 decibelojn, la atakanto ordinare ektimas kaj forkuras. Tamen tiuj ĉi du lastaj rimedoj ne ĉiam havas atenditan efikon. Se la atakanto estas tiomgrade malinteligenta aŭ ebria, ke por li ne tre gravas, ĉu li estos kaptita aŭ ne, li povas daŭrigi sian agadon senatente al la ekfunkciigo de la alarmilo aŭ senkonsidere al sia eventuala markiteco.

### 1.6. Okazaj rimedoj

Kion oni komprenu sub la vorto okaza rimedo? Esence ĉion, kio estas aplikebla por sendangerigi kontraŭulon kaj kio hazarde troviĝas ĉemane. Se oni iras ekzemple tra arbaro, tio estas ŝtono, branĉo, bastono, en parko forrompita vergo, en ĉambro seĝo, tablo-kru-ro, botelo k.t.p. Memkomprene estas necese scii, kiamaniere apliki similajn rimedojn laŭeble plej efike. Tion ni nun koncie

pritraktos.

Ekzistas okazaj rimedoj,

- kiujn oni ĵetas,
- per kiuj oni batas,
- per kiuj oni ŝirmas sin kontraŭ ĵetitajn objektojn aŭ nepaf-armilojn de kontraŭulo k.t.p.

Kiamaniere profiti de tiuj ĉi rimedoj, ni demonstris ĉe la situacio, kiam atakanto endanĝerigas defendanton per ia nepaf-armilo, tio estas per tranĉilo, bastono aŭ la t.n. mallonga bastono (bastoneto). La defendanto povas uzi ekzemple jenajn metodojn:

- 1) Li aplikas rimedon, havantan pli longan atingopovon ol tiu de atakanto. Do, se la atakanto batalas per tranĉilo aŭ bastoneto, la defendanto provas elmanigi la kontraŭul-armilon per bastono, seĝo, tablo- aŭ seĝo-piedo k.t.p.
- 2) La defendanto endanĝerigas la vizaĝon de la atakanto per iu ĵetebla objekto, do plejofte per glaso, botelo, briko, ŝtono k.t.p. La atakanto ordinare ĉesas agi malamike kaj komencas heziti. De tiu ĉi momento oni provu pri vorta solvo de la situacio. Se ĝi estas sensukcesa, la defendanto devas sendanĝerigi la kontraŭulon trafante lin per la objekto. Tial estas bone havi bezonan sperton pri ĵetado de objektoj al vertikale situantaj celoj.
- 3) Per iuj okazaj rimedoj la defendanto povas ankaŭ ŝirmi sin. Al ĉi celo estas tre oportunaj ekzemple seĝo, renversita tablo, mantelo volvita ĉirkaŭ antaŭbrako k.t.p. Ekzemple, li tenas seĝon tiamaniere, ke ties piedoj celas kontraŭ la vizaĝon de la atakanto armita per tranĉilo. Per la piedoj de la seĝo li klopodas bati la vizaĝon aŭ stomakon de la atakanto.

Kontraŭ nepaf-armilojn oni defendu sin - estante sur la nivelo de la reduktita kurso - preskaŭ ĉiam sole tiamaniere. La klarigitaj metodoj estas ege efikaj kaj relative sendanĝeraj por la uzanto. La t.n. "defendoj", kiujn oni ordinare priskribas en diversaj lernolibroj pri la sindefendo, estas ne sole riskaj, sed ankaŭ tre ofte nere-aligeblaj. Tial, ne lernante ilin, ni ŝparas tempon. Fortimiga ekzemplo de tiaspecaj "defendoj" estas jena metodo priskribita en malnova lernolibro pri la ĵujucuo:

"Atakanto tenas en sia levita dekstra mano tranĉilon pint-mal-supren. Defendanto, kiu ŝtaras vidalvide, kaptas per sia maldekstra mano la maldekstran kontraŭul-pojnon kaj entordas ĝin. Nun la defendanto enpaŝas per sia dekstra piedo inter la piedojn de la kontraŭulo kaj per la dekstra mano kaptas lian veston antaŭe. Returninte al la atakanto preskaŭ sian dorson, la defendanto - per rektigo de siaj gamboj, antaŭenflekso kaj forta tiro antaŭen - ĵetas la kontraŭulon surteren!"

Pri aplikebleco de tiu ĉi metodo la pripensema leganto certe mem faros sian opinionon.

Ankaŭ ofte rekomendatajn PARATOjn sekvatajn per kontraŭatako fa-

PARATO (en la sindefendologio) estas metodo por vanigi frapon, bazita sur barado de la frapvojo per oportuna parto de la korpo de paratanto (plejofte per antaŭbrako) aŭ per iu objekto (ekzemple per armilo) aŭ la metodoj, ĉe kiuj oni vanigas frapon per ĝia forbato flanken, supren, malsupren k.t.p.

homa ekzistado sur la blua planedo aspektas, observata fare de aliastranoj. Ke la homa agado ne estas flate priskribita, estas klare.

La lingvaĵo ne estas bona. La aŭtoro, al kiu helpis lingve du aliaj samideanoj, uzas ofte kompleksajn verboformojn tie, kie simpla modo tute bone sufiĉas. Precipe ĝena estas tio en la "Perdrika nesto", en kiu komparano veturigas sian filinon al ŝia edzo kaj ne kapablas trovi konvenajn vortojn, por informi ŝin pri grava akcidento. Eble la aŭtoro intencis signi tiel la animstaton de la patro, sed al mi ne ŝajnas nature, ke simpla homo uzus tian pli komplikan esprimadon en tia frazo "...mi estis en la bieno sarkanta fezeolo/j/n, kiam Zakario aperis..." Tio estas ĝusta gramatike kaj laŭsence, sed ĉe komparano? Kaj li parolas plu: ...li estas ĉiam ŝercanta ...Li estis parolanta... ke li estis ŝtelinta... ktp. Sed ankaŭ lia filino diras: ...por resti ankoraŭ unu semajnon plu feriantaj... Eble la aŭtoro volis imiti dialekton, aŭ - pli verŝajne - li uzas la kompleksajn formojn anstataŭ la sufikso -ad-.

Pri iuj aferoj almenaŭ en la unua rakonto mi mencias: instruisto pri desegno - pli bone desegnado: iĝi plia, ĉiam plia - iĝi eminenta, elstara; hejmen li returnis - revenis; nevulgara elstareco - eksterordinara; ŝi ellasis ĉarmon - elradiis; frenezita - freneza, frenezigita aŭ frenezigiĝinta; ŝuldantiĝis - ŝuldiĝis; li sidiganta...desegnante - sidanta; tra la publikaj vojoj - ĉe, apud /ne temas pri movo, sed sidado/; je rafinita gusto - de; je aristokrataj linioj - de /je estas relative ofte uzita/; kiuj vidas lin ŝancelirante - ŝanceliranta, ĉar ŝi rilatas al "lin", ne al "kiuj"; gratigita - gratita; iulo - tia formo ne eblas, sufiĉas "iu"; la faltoj alsaltis lian vizaĝon - kovris; animo ribelita - ribelinta. La /ne/transitivecon de verboj la aŭtoroj evidente ne kontrolis. Anstataŭ "frunto" mi legas "fronto" sur.p./39, 60.

Sur p. 112 la aŭtoro diras: Sinofero estas la herceco de ĉiuj popoloj. Sed mi pensas, ke anstataŭ "Sinofero" pli konvenus "Foroferado."

Mi esperas, ke ĉiu leganto trovos la libron interesa.

39 MODERNAJ POETOJ. Antologio de la postmilita bosnia-hercegovina poezio. Kompilis Ivan Kordić, esperantigis Ladislav Režek. Eldonis Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, Sarajevo 1985. Eldonkvanto 2000 ekz., 110 paĝoj, 14 x 20 cm. Ilustrinto nenomita.

La bele ekipita libro enhavas 89 modernstilajn poemojn. Inter la aŭtoroj estas neniu virino. En antaŭparolo rakontas la komplinto pri historio de Bosnio kaj Hercegovino. Rimarkinde estas, ke li mencias la Olimpiajn vintrajn ludojn en la j. 1984 en Sarajevo, sed diras nenion pri la fatala atenco de studento Gavriilo Princip 28. 6. 1914.

Ĉiuj poemoj estas lirikaj, pri naturo, aĵoj nin ĉirkaŭantaj, pri soldatoj, partizanoj, sed pri amo rakontas nur Ave Maria. Temas pri malĉasta virino, sed la poemo ne enhavas vulgaraĵojn. Tiuj ĝenerale ne ekzistas en la libro, mi konstatas kontente.

La poemoj estas belaj kaj oni devas tre atente legi ilin. La unuaj kvar poemoj kaj du sur p. 16 estas sonetformaj, sed rimoj - memkomprene - ne estas klasikaj. La versoj de du poemoj /p.69-71/ estas tro longaj, ili fakte estas "proza poezio".

Neperfektaĵoj ne mankas kaj estus tre bonvenaj klarigoj pri aferoj specife jugoslaviaj kaj pri vortoj, en PIV netroveblaj: bogo-

mila loĝantero /p.3/; Kosara /9/; forelo /17,32/; patarena lingvo /18/; lingo subbrake /21- ligne ĉi tie ne konvenas/; Kalemag - danoj, Nevaj Avenioj /25/; Mrakodol /31/; spego /84/; sunareno /86/; milmoneto /92/; epruveto /94/; lakra /97/; Ĉerin - Ĉerina /99/; virdigro /99/ kaj vere multe da aliaj esorimoj. Sur p. 2,3,4 oni legas "hereditaĵo", sed la ĝusta "heredaĵo" troviĝas sur p. 9. Sur p. 17:... ĝis la turpega bru' ne droniĝis... kaj ĝis ne cikatriĝis la vundo. Laŭ PAG par. 253 devus esti: ...dum la turpega bru' ne dronis /netransitiva/...kaj dum ne cikatriĝis la vundo, aŭ:...ĝis la turpega bru' dronos...kaj ĝis cikatriĝis la vundo. Maleblaĵon mi trovas sur p. 3: kvarjarcentjara - ĝuste kvarcentjara. Sinki, halti estas netransitivaj, tial estas malĝuste sinkiĝi /87/, haltiĝi /21,76/. Anstataŭ "estaĵo" /76, 79, 87/ mi preferas "estulo" /PAG par. 330/."Gorĝo" ne donas sencon dufoje sur p.51: Gorĝe en fragojn /titolo/ kaj ... mi venis kiel gorĝe en fragojn. Ankaŭ preseraroj ne mankas. Tre ĝena estas tiu sur p. 91: anstataŭ "okulo" estas presite "ol ulo". Pro eraroj sur p. 2-5 kulpas ne la tradukinto, sed la kompilinto, t. e. la aŭtoro de la Antaŭparolo.

Bone estas, ke oni aldonis notojn pri la 39 aŭtoroj - vivdatojn kaj nomojn de verkoj.

# Rondeta vivo



**P R A H A .** Praga esperantista klubo atentigas ĉiujn siajn membrojn kaj vizitantojn, ke ekde la 2-a de marto 1987 okazas la klubaj kunvenoj en nova klubejo en Agitcentro "Kodanská" en Prago 10 - Vršovice, anguldomo de la stratoj Kodanská kaj Norská n-ro 3, ĉiulunde escepte de 30. 3. kaj 8. 6. 1987. Oni komencas je la 18.30 h. Atingebleco de la klubejo: per autobusoj n-roj 101, 135, 213, 126 - el autobusigu ĉe haltejo "Kodanská"; per tramoj n-roj 4 aŭ 22, el tramigu ĉe la urbdomo de Vršovice sur Moskevská-strato. De metroo sur "náměstí Míru" oni veturas per autobuso unu stacion aŭ per tramo tri staciojn. Ni estas konvinkitaj, ke la nova klubejo placos al vi.

La 12-an de februaro informis prezidantino de EK Prago la plenkunsidon de la Urba Pakkonsilantaro en Prago pri la pacagado de la klubo dum la jaro 1986 - de Jaro de la Paco. Samtempe si menciis la UNESKO-Rezolucion kaj la kunlaboradon de MEM kun Monda Pakkonsilantaro. La informo estis akceptita per aplaudo, esprimanta grandan simpatian de la ceestantaro al nia movado.

En la jaro 1986 sukcese finis la korespondan kurson de Esperanto jenaj kursanoj:

- ĉe kursestrino Helena Štruncová: Ing. Jana Heřmanová,  
Helena Hradecká,  
Michaela Petrasová,  
Jaroslava Kovářová - ĉiuj el Praha,
- ĉe kursestrino Eva Hoffmannová: Romana Justová, Mělník, sídliště Podolí 2683,  
Renata Miloševičová, Praha 1, Jakubská 4,  
Jana Šourková, Jirkov, Říjnové revoluce 1009,  
Milan Těšínský, Třebovice v Čechách 239,  
Marta Terpajová, Praha 7, Heřmanova 1.

Al ĉiuj ni kore gratulas kaj bonvenigas inter niaj legantoj!





La pasintjara Kristnaska vespero de la Praga Klubo estis tre sukcesa. Oni komune kantis kristnaskajn kantojn (vidu parton de la klubanoj sur la foto) kaj gojatenadis multajn subarbetajn donacojn, inter kiuj tre alloga estis granda torto kun cehlingva surskribo: 100 jaroj de Esperanto.

La pasintjara E-kurso de s-anino Štruncová en Praha estis eksterordinare sukcesa. Ĉiuj kursfinintoj aliĝis al la klubo kaj du el ili eĉ geedzigis! La 25-an de oktobro 1986 s-ano Petr Kníchal el la konata E-familio edzigis al s-anino Hana Semelková. Al la junaj geedzoj ni deziras ĉion plej bonan!

Renkontiĝon de junaj esperantistoj, kiu okazis deum la semajnfino de la 17-a ĝis la 20-a oktobro 1986 en Bernburg, GDR, partoprenis krom GDR-anoj ankaŭ 11 gejunuloj el Pollando. En nova kvartalo de Bernburg, apud ĉefa promenejo, la urba konsilio disponigis al la esperantistoj terenon, sur kiu ĉiuj komune plantis arbojn. La plej videbla el tiuj arboj, ĝi estas fago, ricevis memorŝtonon kun la surskribo " arbo de amikeco - 100 jaroj de Esperanto - 1887 - 1987 ".



**P Ě Í B R A M.** Pasintaŭtune jam estis 25 jaroj ekde fondiĝo de EK Přebíram. La jubileo ĝi festis komune kun sia sindikata patrono, kiu estas je 10 jaroj "pli aĝa". Dum tutsindikata konferenco estis en parolado, samtempe en regiona gazeto, proksimigita agado de ĉiuj apartenaj rondetoj, de la Esperanta speciale. Oni povas konstati, ke agado de esperantistoj en la urbo Přebíram envicigas en tutevitan agado diversforma kaj diverstema, precipe tiu kultura kaj porpaca. En ĉi bulteno ni jam kelkfoje priskribis ĝin, kaj tial hodiaŭ ni nur anoncas, ke la 16-an de majo 1987 ni jubileos festmaniere. Sub auspicio de la Sindikata Klubo de Uraniaj Minejoj okazos festa renkontiĝo de esperantistoj, kien vi estas sincere invitataj.

La renkontiĝo enhavos tri temojn:

1. 25 jaroj de EK Přebíram - pri tio parolos 25-jara /deĵore, ne aĝe/ estro de la EK Jaroslav Vácha,
2. 100 jaroj de Esperanto - parolos poeto Jiří Karen,
3. 75-jara vivjubileo de amiko de EK Přebíram - teatro-artisto Emil Kavan - kiu, kvankam neesperantisto, multfoje prezentis sin enkadre de la EK kaj multflanke helpis al ĝia agado...

Kompreneble ne absencos ankaŭ amuz-programo, speciale muziko de BARBULOJ. Oficialaj invitoj estos ankoraŭ dissenditaj. Sed kiu ne ĝisatendos, skribu al adreso: Karel Kraft, Zupanovice 49, 262 15 BOROTICE, Ĉeĥoslovakio. M. T.

**Ú S T Í nad Labem.** El ampleksa raporto pri la aktivecoj de la EK de Domo de Kulturo ROH en Ústí n.L. en la jaro 1986 ni elprenas la programon de 10 monataj kunvenoj:

30. 1. - Jarkunveno, raporto pri la aktivecoj de la rondeto, diskuto, elekto de komitato. Prelego: Esperantistoj en la laborista movado de Nordbohemia regiono.
27. 2. - La Februaraj Eventoj en 1948. Matej Bel - la plej grava polihistoro de sia tempo - Ing. J. Kříž. Problemaro de sango-donacado en distrikto Ústí n. L. - M. Šolcová.
27. 3. - Internacia Akademio de Sciencoj en San-Marino uzas Esperanton kiel sian ĉeflingvon - V. Novobilský. Geologiaj interesajoj de Nordbohemia regiono - A. Šolc. Filatelio en Esperanto - J. Rokos.
24. 4. - Novaj konoj en la astronomio - Ing. J. Link. Novaj projektoj de artefaritaj lingvoj - J. Nový. Nederlanda firmo BSO uzas Esperanton - Ing. Kříž.
29. 5. - La gloraj majaj tagoj - rememoroj de memorantoj. Pri kalkulumoj - Ing. J. Kříž. Nuklea energio por pacaj celoj - V. Novobilský.
26. 6. - Novaj direktoj en la diabetologio.- MUDr. Páral. Karel Čapek pri filatelio - J. Rokos. Informoj pri la preparata kongreso de ĈEA kaj proponoj por kandidatoj por la nova Centra Komitato.
- 26.-27.9. - Kulturfestivalo honore al Jiří Kořínek, merita rondetano, elstara literatura aganto kaj publicisto, kun jena programo:
  - 26.9. - socia interkomatiga vespero en la Domo de Kulturo ROH. En kultura programo prezentis sin solisto de Teatro en Ústí n. L. Miroslav Smyčka kun pianakompano de Magda Cihlářová kaj Jan Duda, violonisto, membro de Moravia filharmonio en Olomouc, ekspozicio de publikaĵoj de Jiří Kořínek, magnetofona intervjuo kun J. Kořínek, kiu dum la tempo de la Festivalo estis enhospitaligita,
  - 27.9. - ekskurso de festivalanoj al Dečinaj Sablorokĵoj (Hřensko, Mezná Louka); en la Domo de Kulturo projekciado de Esperantaj filmoj kaj prelego pri Japanio /F. Patera/.
- Vespere: solena koncerto je honoro de la 80-a naskiĝdatreveno de J. Kořínek en la Domo de Kulturo. Partoprenis membroj de la Ŝtata Teatro de Z. Nejedlý en Ústí n.L. Miroslav Smyčka /baritono/, Dagmar Blažková /soprano/, Jiří Endršt /baso/ kaj Jana Vlková /pianakompano/. Recitis Eva Seemannová /Praha/.

- Violon-soloj; Jan Duda /Moravia filharmonio Olomouc/.
30. 10. - Rememoro pri GOSR - A. Šolc. A. Tomecki kantas en Esperanto /sonbendo/. Esperanto - lingvo de la monda literaturo - D-ro Jákí, Hungario /sonbendo/.
27. 11. - Informo pri la seminario de estroj de E-rondetoj en Přerov - V. Novobilský, Esperanta sondisko de Olivier Tzaut - montraĵoj.
13. 12. - Tradicia Kristnaska Vespere de la E-rondeto. En la programo prezentis sin M. Smyčka /baritono/ ĉe pianakompano de M. Cihlářová. Rememoron je la 127. datreveno de naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof eldiris V. Novobilský. Sekvis kolektiva kantado de kristnaskaj pastoraloj en traduko de J. Kořinek kaj pianakompano de V. Novobilský. Bongusta refreŝiĝo en la solene ornamita salono estis kompletigita per sorcista prezento de Václav Vanc jun.

Okaze de la Tago de Laborantoj de Kulturo 1986 estis la 29-an de oktobro 1986 transdonita al Jiří Kořinek diplomo kun jena teksto: "Uĉelujeme ĉestné uznání s. Jiřímu Kořínkovi za dlouholetou činnost v oblasti překladu české a slovenské poezie do mezinárodního jazyka esperanto" (honordiplomo por longjara tradukado de la ĉeĥa kaj slovaka poezioj en Esperanton) - subskribita estas la sekciestro pri kulturo de la Nordbohemia Regiona Nacia Komitato en Ústí nad Labem.

Pri la vivojubileo de Jiří Kořinek aperis artikoloj en Průboj, ĵurnalo de la regiona komitato de la Komunista Partio de Nordbohemia regiono, 1.10.1986 - kun foto, en Budapeŝta Informilo, Heroldo de Esperanto, Dia Regno, Starto k. a.

La rondeto en Ústí n. L. havas amikajn rilatojn kun la E-klubo en Ŝumen /Bulgario/, Gijon /Hispanio/ kaj kun esperantistoj en Leningrad. Membroj de la rondeto publikigis artikolojn en nacilingvaj ĵurnaloj (V. Novobilský en Průboj 28. kaj 29. 6. 1986) kaj ankaŭ en la radio (28. 8. 1986 Radiostacio Ústí n.L.: Aplikado de Esperanto en la scienco kaj tekniko - V. Novobilský, aplikado de Esperanto en literaturo - J. Kořinek - 15 minutojn; 1. kaj 2. 9. 1986 - informo pri la internacia terminologia kurso en Roudnice n. L. - Radiostacio Ústí n.L.; 2. 10. 1986 - en programero "Kaj la jaroj pasas..." parolis J. Kořinek kaj V. Novobilský, en reĝio de V. Matějová la programon preparis Jiří Mohaupt - Stacio Praha, 30 minutojn, la programero estis anoncita en revuo Rozhlas (Radio) kun foto de J. Kořinek; 16.10. informo pri la DLT-projekto - V. Novobilský, Stacio Praha; 13.12. informo pri la 127-a naskiĝdatreveno de L.L. Zamenhof kaj pri la kristnaska vespero de la E-rondeto en Ústí n.L.; Stacio Ústí n.L.

En la Pedagogia Fakultato en Ústí n.L. finiĝis la seminario de soci-politika praktiko de studentoj sub titolo "Rondeto de internacia amikeco kaj pac-aktiveco", kiu funkciis en la jaroj 1981-86. En ties kadro studentoj partoprenis kurson de Esperanto dum 1 horo semajne. La partopreno en la seminario estis notata en indekso de ĉiu studento. Tiu ĉi Esperanto-instruado estis versaĵe la sola oficiala E-instruado en alternejoj en ĈSR en tiu ĉi tempo.

V. N.

# informoj

## 43-a LJK KRAKOW

Internacia Junulara Kongreso de TEJO - Tutmonda Esperantista Junulara Organizo - okazos inter la 17-a ĝis 24-a de julio 1987 en historia urbo Krakow. Krom komitat-kunsidoj de TEJO okazos distra amuza programo, kiun preparas Pola Esperanto-Junularo kunlabore kun Pola Studenta Esperanto-Komitato.

Ĉiuj interesigantoj tuj aliĝu al Junulara sekcio de ĈEA, Jilská 10, Praha 1.

## MAGNETOFONOVA SLUŽBA ĈES

Vyživejte služeb magnetofonové služby Českého esperantského svazu. O nahrávky si pište na adresu: Josef Filip, Nádraží ČSD 146, 768 11 Chropyně.

# lingva angulo

## Kaj Bohemio, kaj Ĉeĥio!

En STARTO /1985, 4-5, 30-33/ aperis interesa artikolo de J. Chvosta, kiu detale eksplikis la devenon de ambaŭ propraj nomoj. Tamen lian opinion, ke en Esperanto temas pri sinonimoj, el kiuj la dua estas preferinda, oni apenaŭ povas partopreni.

Ĉeĥio /arĥaisme Ĉeĥujo/ estas la lando de la ĉeĥoj, t.e. la ĉeĥlingvanoj. Temas do pri nomo derivita de la nacio parolanta la ĉeĥan lingvon. Tiu nacio loĝas en la tri teritorioj, kiuj estas nomataj:

1. Bohemio /laŭ la latina Boihaemum, ĝermane Baiaheimon, t.e. hejmo de la kelta tribo "boioj"/;
2. Moravio /laŭ la rivero Moravo/;
3. Silezio /laŭ la pola rivero Slenzo; ja la pli granda parto de Silezio estas loĝata de popoloj kaj apartenas al Pollando/.

Laŭ la loĝataj teritorioj, la ĉeĥoj estas bohemianoj /obyvatelé Ĉech/, moravianoj /Moravané/ kaj silezianoj /Slezané/. Nenial do oni rajtas identigi ĉeĥojn kun bohemianoj, Ĉeĥion kun Bohemio, ĉar ĝi estas - kaj en la ĉeĥa lingvo, kaj en Esperanto - grava semantika miso. Fakte direkte: Ĉeĥio estas hiperonimo rilate al Bohemio.

Krome oni ne neglektu la fakton, ke Internacia Lingvo devas bazi sian geografian nomenklaturon laŭeble sur formoj internaciaj. Ja ne eblas dubi, ke Ĉeské středohoří estas Bohemia mezmontaro. Nomi ĝin "Ĉeĥa mezmontaro" estus malpreciza termino /ĉar ĝi ne situas ankaŭ en Moravio kaj Silezio/, laŭ la nomenklatura vidpunkto spitantu la ĝenerale internacian uzon.

J. Kavka

## Ĉeĥio = Ĉesko

Estimata redakcio de Starto, mi akceptas alvokon por diskuto pri la artikolo "Ĉu Bohemio, ĉu Ĉeĥio?" de J. Chvosta.

En la menciita artikolo ne nur surskribo, sed ankaŭ rezulto estas malĝustaj. Eĉ en rezulto aperis du kontraŭdiroj: 1/ "En la ĉeĥa lingvo estas tiu problemo en alia nivelo: Ĉeĥio estas ne nur Bohemio, sed ankaŭ Moravio..." 2/ "Sed en la ĉeĥa lingvo tiu Ĉeĥio signifas nur Bohemio, ne Moravio..." Nur la unua estas ĝusta. Mi klarigos kial. Pro tio mi tradukis substancan parton de artikolo "Ĉesko = Česká socialistická republika / Ĉeĥio = Ĉeĥa Socialisma Respubliko/, kiu estis publikita en n-ro 4/1983 de gazeto "Naše řeč" /Nia lingvo/, kiun eldonas Ústav pro jazyk český CSAV /Instituto pri la Ĉeĥa Lingvo ĉe Ĉeĥoslovaka Scienca Akademio/ kaj poste en revuo "Lidé a země" /Homoj kaj tero/ en n-ro 10/1983.

Jen traduko:

- 1/ Nomo "Ĉesko" estas taksata laŭ lingva vidpunkto kiel nomo tute normlingva. Ĝi estas uzata kiel unuvorta sinonimo de ĈSR, simile kiel estas uzata esprimo "Slovensko" por mallongigo de plena konstitucia nomo de SSR. Tiun ĉi mallongan indikilon neprigis socia bezono por interkompreniĝo post Ĉeĥoslovaka federaciigo en

1968. Al unuvorta indiko Slovenio /Slovakio/ paralelas Ĉesko /Ĉeĥio/.

- 2/ Por la nomo Ĉesko /Ĉeĥio/ ni komprenas ĉeĥajn landojn, t.e. Ĉeĥio /Bohemio/, Morava /Moravio/ kaj ĉeĥoslovakian parton de historia Slezsko /Silezio/, alivorte dirite, parton de ĉeĥoslovakio sen Slovakio.
- 3/ Nomo "Ĉesko" estas kreita tute ĝuste kaj organikike. Ĝi estas derivita el adjektivo "ĉeský" /ĉeĥa/, simile kiel estas duopoj: slovenský-Slovenio, polský-Polso, srbský-Srbsko, maĉarský - Maĉarsko /slovaka-Slovakio, pola-Polio, serba-Serbio, hungara-Hungario/ ktp.
- 4/ La nomo "Ĉesko" ne estas en la ĉeĥa lingvo nova. Ekzistas jam en 1777, normale uzadis ĝin ekz. verkistoj J. Kollár, B. Jablonský, P. Chocholoušek k.s. Eventuala sentoŝarĝo de la esprimo /donita ĉefe pro tio, ke al pli aĝa generacio ĝi memorigas protektoratan "Tschechei"/, estas afero tre pasema kaj tempe limigita, la mezgeneracio jam ne sentas ĝin. Kiel argumento kontraŭ la socia bezono de unuvorta esprimo kaj ĝia lingva organikeco ĝi ne sukcesas, ankaŭ pro tio, ke eblas apogi sin je 200 jara ekzistado de esprimo "Ĉesko", kiu havis por la tempo de nacia renaskiĝo tute jesen sencon. Post ofta ĝia uzado perdiĝos ĝia senkolorigo, kiun sentas la pli aĝa generacio, kiel pri tio atestas ĝia ĉiam pli ofta uzado ekz. de niaj eminentaj geografiistoj, kartografiistoj, natursciencistoj k.a.

Rezulte ni resumas: esprimo "Ĉesko" estas kreita ĝuste, organikike kaj estas funkcias, do ĝia uzado estas objektivite kialigita pro ĝia bezono en socia interkompreniĝo. Ĝi estas unuvorta sinonima indiko de Ĉeĥa Socialisma Respubliko, t.e. de teritoria tuto de tiu parto de Ĉeĥoslovaka Socialisma Respubliko, kie oni parolas ĉeĥe kaj kie vivas ĉeĥa nacio.

Tiom la citaĵo, verŝajne tio sufiĉas al la baza problemo, sed restas la dua. Kiel esperantigi ĉeĥajn nomojn de departementoj /regionoj/? Necesas solvi problemon kiel vorton "ĉeský" tradukadi, ĉar ĝi en la ĉeĥa lingvo rilatas aŭ al nacio aŭ al teritorio. Pri similaĵaj problemoj ni jam povis legi en pluraj E-gazetoj. Do, por eviti miskomprenon ankaŭ ni uzu logike la finaĵon - ia se temas pri lando kaj -a se temas pri nacio. La fakto, ke limo inter -bohemiaj kaj -moraviaj departementoj ne samas kun limo inter Bohemio kaj Moravio ne decidas.

Konklude: Ĉeĥio - ĉeĥa, rilatas al parto de Ĉeĥoslovakio sen Slovakio; Bohemio - bohemia, rilatas al okcidenta parto de Ĉeĥio; Moravio - moravia, rilatas al orienta parto de Ĉeĥio; ĉeĥo - ĉeĥa rilatas al nacio /ankaŭ al gento kiu donis nomon al ĉeĥa nacio/; moravo - morava rilatas al estinta slava gento, laŭ kiu ricevis Moravio nomon.

Atenton! La esprimo bohema rilatas al vivmaniero, ne al Bohemio!

Václav Stibůrek

/fino de sur la paĝo 10/

Kiam aviadilo startis, ni ambaŭ tuj ekdormis pro laco. Nur la muĝado de pasageroj, kiuj komencis forlasi la aviadilon en flughaveno Sofio, vekis nin.

Mi estis feliĉa pro belega ekskurso kaj ĉefe, ke mi ne devis resti sola nokte en flughaveno Varna.

JARY

Internacia seminario "Historiaj kaj sociologiaj aspektoj de la Esperanto-movado"

La ĉi-tema seminario okazis inter la 10a kaj 15a de novembro 1986 en la konata seminariejo kaj ripozejo de Kulturligo de GDR en Bad Saarow /ĉe Berlin, GDR/. Partoprenis 21 fakuloj kaj interesitoj el Bulgario, CSSR, FRG, GDR, Hungario kaj Pollando. Oni aŭskultis kaj verve debatis jenajn prelegojn:

- Kiel nomi la lingvon de Zamenhof: Esperanto aŭ ILo? /d-ro Detlev Blanke, GDR/
- Komenco de organizata Esperanto-movado en la mondo /Olga Cankova, Bulgario/
- Historio de la scienc-teknika apliko de Esperanto /prof. d-ro Otto Haszpra, Hungario/
- Evoluo de terminologiaj principoj: influoj inter planlingvo kaj etnolingvo /Wera Blanke, GDR/
- Sociologia difino pri Esperanto - la strategia fono de la problemo /Sandor Révész, Hungario/
- Sociologia analizo de la bulgara Esperanto-movado /Kunĉo Valev, Bulgario/
- Kelkaj rimarkoj pri metodologiaj aspektoj de la verkado pri historio de landa Esperanto-movado - okaze de recenzo /Siegfried Linke, GDR/
- Pri internaj ŝanĝoj de la 85jara hungara Esperanto-movado /d-ro Árpád Ratkai, Hungario/
- Stato kaj metodologiaj problemoj de la esplorado pri la historio de la germana laborista Esperanto-movado /d-ro Detlev Blanke, GDR/
- Lingva kvalito kaj publika opinio /Michael Behr, GDR/
- Juraj aspektoj de landaj esperantistaj organizaĵoj /Boleslaw Staszczak, Pollando/
- Reflektiĝo de socisistemaj diferencoj en la leksiko de Esperanto /d-ro Detlev Blanke, GDR/

La lastan tagon okazis tre vigla diskuto pri la motivoj de la lermado de Esperanto kaj pri la eventuala forlaso de la movado fare de siaj adeptoj.

Krome okazis diapozitivaj prelegoj pri Pekino /Universala Kongreso 1986, d-ro Dr. Blanke/ kaj Esperanto sur poŝtmarkoj /Rudolf Burmeister, GDR.

Boleslaw Staszczak informis pri la preparlaboroj lige al la jubileaj kongresoj 1987 en Pollando, aparte pri la 72a UK, kio vekis fortegan debaton pri la celo kaj enhavo de la jubilea kongreso. La seminario sendis al UEA, al la LKK, al Pola Esperanto-Asocio ĉi rilate proponojn por konsidero.

Krom la kadrotema seminario okazis kunsidoj de kelkaj fakuloj pri la problemoj de scienc-teknika aplikado de Esperanto, sub la gvido de la UEA-estrarano prof. d-ro Otto Haszpra. La ĉefajn konkludojn de la seminario kaj de la grupo pri scienc-teknika apliko de Esperanto ni publikigas sube. La seminarianoj ekskursis dum unu tago al Berlin, ĉefurbo de GDR. La tuta seminario okazis sub ekskluzive bonnegaj teknikaj kondiĉoj kaj ofertis bonkvalitan plenan pensionon por la ridinde malalta prezo de nur 100 markoj.

Enkadre de la Internacia Seminario pri "Historiaj kaj sociologiaj aspektoj de la Esperanto-movado" la organizantoj donis eblecon por kelkaj diverslandaj reprezentantoj de la aplikado de Esperanto sur natur-sciencaj kaj teknikaj terenoj por pridiskutado de la ĉi-ri-

lataj situacio kaj taskoj kun la celo helpi la laboron de la proksimestonte kunvokata natur-sciencia kaj teknika komisiono de UEA. En la traktado de la temo enkadre de la aparta scienc-teknika sekcio de la seminario partoprenis: Aleš Bednařík /CS/, Michael Behr /GDR/, Wera Blanke /GDR/, D-ro Otto Haszpra /H/, Boleslaw Staszczak /PL/, Peter Todorov /BG/.

Sub la prezidado de s-ro Haszpra /estrarano de UEA pri scienc-teknika aplikado /STA/ de Esperanto/ la kunvenintoj pritraktis la temojn laŭ sekva tagordo:

- Enkonduka prelego: Antaŭaĵoj, celoj kaj laborplanoj de UEA pri STA /Haszpra/;
- prelegetoj pri spertoj koncerne STA en unuopaj landoj,
- prelegeto pri la stato kaj taskoj de la terminologia agado/W.Blanke/;
- diskuto pri la enhavo kaj utiligeblo de la Jubilea informmaterialo de UEA pri STA,
- diskuto pri la laborplano de UEA kaj pri taskoj de la UEA-komisiono pri STA kaj de landaj kaj fakaj asocioj,
- formulado de rekomendoj pri la laborplano de UEA por la unua kunsido de la UEA-komisiono pri STA.

Rezulte la sekcio konstatis, ke la rezolucio pri faka agado formulita dum la UK en Pekino 1986 kaj akceptita de la Komitato de UEA kaj same la konkludaroj de la internacia seminario pri "Aktualaj problemoj de la scienca kaj teknika aplikado de Esperanto" aranĝita en Bad Saarow /GDR/ fine de 1982 estas absolute aktualaj kaj utiligeblaj kiel gvidlinio por la agado de UEA en la scienc-teknika kampo.

La sekcio konstatis, ke la rezolucio de UNESCO 23C/Res. 11.11 akceptita en jaro 1985 estas multflanke utiligebla por la plifirmigo kaj evoluigo de la pozicio de Esperanto ankaŭ en sciencaj kaj teknikaĵoj rondo.

La sekcio konstatis, ke la materialo "Esperanto-lingvo de la natur-sciencoj kaj tekniko" taŭgas post kelkaj negravaj modifoj kiel ĝenerala informaro por sciencaj kaj teknikaĵoj rondo kaj kiel baza materialo por inform-celaj artikoloj en neesperantistaj fak-ĵurnaloj kaj fak-kunvenoj, tamen estas kompletigenda per bibliografiaj indikoj.

La sekcio trovis, ke la ĝenerala inform-materialo "An Update on Esperanto" lastatempe preparita de UEA kelkloke bezonas modifojn parte por eviti malfavorajn reagojn en kelkaj regionoj kaj kultursferoj, parte por pliserioze prezenti la fakajn utiligeblecon kaj jaman utiligitecon de la lingvo en la epoko de la scienc-teknika revolucio.

La sekcio trovis urĝa, ke la planita natur-sciencia kaj teknika komisiono de UEA fakte formiĝu kaj komencu sian agadon kiel eble plej frue, ke jam dum la jubilea jaro la unuaj rezultoj estu atingeblaj. La sekcio konstatis, ke tiu komisiono kunsidu temp' al tempo en diversaj landoj kaj porokaze kompletigu sin per elstaraj fakuloj-esperantistoj de la koncerna kaj najbaraj landoj.

La sekcio aparte emfazis, ke la efika organizado kaj unuecigo de la terminologia agado estas nemalhavebla parto de la evoluigo de la scienca kaj teknika aplikado de la lingvo kaj ĝi apogas la decidon de UEA fondi termin-normigan institucion kaj reton, en kiu laŭeble kunlaboru ĉiuj elstaraj individuaj kaj kolektivaj kultivantoj de la terminologia kampo.

La sekcio emfazas, ke la landaj kaj fakaj asocioj kaj institucioj aktive partoprenu en la disvolvado de la scienca kaj teknika apli-

kado de Esperanto - laŭeble nomante eĉ apartan komisionon aŭ almenaŭ komisiitojn pri scienc-teknika aplikado - dum la centraĵ organoj /estraro, komitato/ donu gvidprincipon kaj moralan kaj laŭeble financon apogon por tiuj laboroj. Le gvidprincipoj estu rezulto de vastskala pridiskutado en fakaj rondoj, dum la morala kaj financa epogo estu tiagrada, kian tiu agado plenumanta gravajn postulojn de la moderna epoko meritas kaj nemalhaveble bezonas.

La sekcio rekomendas, ke la unua kunsido de la Scienca kaj Teknika Komisiono de UEA vaste utiligu tiujn detalajn rimarkojn kaj proponojn, kiujn la partoprenintoj de la scienc-teknika sekcio de la seminario de Bad Saarow kolektis.

La sekcio petas, ke proponoj pri la scienc-rilata agado de UEA kaj de ties aliĝintaj kaj kunlaborantaj asocioj estu senditaj urĝe al la estrarano pri scienc-teknika agado de UEA.

# anoncoj

## FOTO - KONKURSON

pri la temo: "Esperanto-aranĝoj" organizas Esperanto-Klubo, Parkowa 6, 28-200 STASZOW, Pollando. La kondiĉo de la partopreno estas, ke sur la fotografaĵo estu videbla unu el elementoj /signoj/ de Esperanto. Formato: 13 x 18 cm kaj pli. Skribu la titolon. La templimo: ĝis la 30-a de oktobro 1987 j. La fotografaĵoj ne estos resenditaj, ili restos en la arkivo kaj ĉiujn oni prezentos en ekspozicio.

Samarkanda Klubo de Interpopola Amikeco "Esperanto" organizas internacian ekspozicion pri la agado por la sana vivmaniero, kontraŭ alkoholo kaj fumado en diversaj landoj. Tiucele ni kolektas ĉiulingvajn tiutemajn afiŝojn, fotojn, desegnaĵojn, insignojn, gluetikedojn, poŝtkartojn, revuojn, librojn kaj ĉiujn ceterajn propagandilojn de la sana vivmaniero. Ni korespondas tiuteme en Esperanto, la angla, rusa, uzbeka kaj laŭbezone ankaŭ en aliaj lingvoj. Bonvolu sendi ĉion al: International Friendship Club "Esperanto" P. O. Box 76, 703000 SAMARKAND, Uzbekistan USSR. Al ĉiu helpono ni sendos laudezirajn memoraĵojn. Daŭre validas.



33-jara diplomita flegisto volas korespondi kun esperantistino el Ĉeĥoslovakio. Liaj intereso: medicino, precipe psikiatrio kaj neurologio. Li satas danci, promeni en la naturo kaj ĝui la silenton en la naturo, vojaĝi per automobilo, iri al kinejoj, legi interesajn librojn, naĝi, li satas la sunon. Lia adreso: Eugen KUTZ, Fachklinik "Fürstenhof" 3390 Bad Wildungen, B.R.D.

En ago de 92 jaroj forpasis en Prago la 19-an de januaro 1987  
s-ano Benjamin V ĉ k,  
membro de CEA ekde la 1972-a jaro. Honoron al lia memoro!



# KONVERSACIO por progresintoj



Sepa temo: MANGADO KAJ TRINKADO.

Se oni ne mangus, oni malsatus, se oni ne trinkus, oni soifus. Daŭra malsato kaj soifo finas per morto. Sed oni mangas kaj trinkas sobre, ne diboĉe.

Mangaĵojn preparas kuiristoj el krudaj nutraĵoj. Plej multaj nutraĵoj devenas el vegetaĵoj kaj bestoj. El mineraloj oni uzas rekte nur salon kaj akvon, sed feron, kalcion, fosforon, jodon kaj aliajn oni havigas per vegetaĵoj aŭ bestoj. Oni kuiras sur fornoj en rondaĵ kaj larĝaj kaseroloj, pli altaĵ potoj, diversformaj pelvoĵ kaj fritiloĵ, plataĵ pladoĵ aŭ bulaj kruĉoj. Ofte ili estas kovritaĵ per kovriloĵ. Dum la kuirado efikas la varmo, kiu interalie boligas la akvon kaj aliajn likvaĵojn. Antaŭ la boligado oni rasper ion malmolan, knedas ion densan, kirlas ion fluan, miksas diversajn nutraĵojn, sensĉeligas fruktojn, senskvemigas fiŝojn, bulkerumas tranĉaĵojn de viandoĵ aŭ legomoĵ, farĉas internon de ia plenaĵo, garnas ĉirkaŭe per io, spicas, sukeras, pipras, salas aŭ tranĉas. Sub la kovrilo oni stufas per vaporo, fritas en graso aŭ sebo, rostas viandon, brogas per bolanta akvo, bakas en bakuĵo farunaĵojn kaj aliajn mangaĵojn, ĝis ili havas kruston. Gratenita mangaĵo estas surkovrita per bulkeroj kun butero kaj bakita ĝisbrune. Frikasita viando estas tranĉita en pecoj kaj kuirita en saŭco. Per bolanta akvo oni infuzas ian krudaĵon, por ke la bolanta akvo enprenu sukojn de la krudaĵo. Grason aŭ sebon oni fandas kaj rostbrunigas. Post tio restas rekrementoĵ. Por ke mangaĵo aŭ nutraĵo ne difektiĝu, oni metas ĝin en fridujon kaj frostigas, aŭ sekigas, peklas en salo, fumajas, konfitas en sukero, marinas en oleo, sterilizas en vaporo kaj konservas alimaniere.

Homo prenas mangaĵojn per buŝoj. Dentoĵ, lango kaj salivoĵ ilin mordas, malsekigas kaj pistas. Unuopajn buŝpecojn oni englutas tra faringo. Ili venas en stomakon, kie ili estas kemie modifitaj per stomakaj sukoĵ. Ankaŭ galo, kiun eligas hepato, modifas ilin. En la stomako kaj en la sekva duodeno fariĝas el la mangaĵo kaĉo, kiu nomiĝas ĉimo. Tiu kaĉo estas ankoraŭ kemie modifita kaj estigas likvaĵon, kiu nomiĝas ĉilo. La ĉilo penetras vandojn de maldika intesto, kiu nomiĝas parioĵ, kaj eniras sangon, kiu disportas ĝin tra la korpo. Nesolveblaj partoj de la ĉimo venas en dikan inteston. Ili estas solidaĵ, sed malsekaj por esti glitaj. Ili amasiĝas en rektumo kaj la korpo eligas ilin tra anuso eksteren kiel fekajojn. La tuta procedo estas digestado kaj eĉ nedigesteblaj partoj de la nutraĵo estas gravaj.

La homoj mangas kvinfoje en unu tago. Al la matenmango estas bakaĵo kun varma trinkaĵo. Oni trinkas teon, kafon, kakaon, lakton, ĉokoladon. Selakto restas el la lakto post apartigo de kremo kaj kazeo. Buterlakto restas post produktado de butero. Kafo estas infuzaĵo el kaferoj. Malta kafo estas infuzaĵo el brumbakita greno. Somere oni matenmangas eĉ malvarman trinkaĵon. Bakaĵo estas pano, bulko, kornobulko, daĉa kuko, kiu estas diversforma, el pelvo aŭ el poto, farĉita kuko estas buĉto, delikata estas biskoto por infanoĵ, seke malmola estas biskvito, krakanta krakeno, maldika oblato, fritita krespo, plata skono, ajlita toŭsto, bruna marcipano, kaĉo

aŭ tre dolĉa torto. Kelkajn bakaĵojn oni surŝmiras per graso, butero, fromaĝo, kazeo, frukta marmelado, spica mustardo, viando aŭ legoma pasteĉo. Al intermanĝo estas ankaŭ bekaĵo kun fumaĵitaj salamoj, kolbasoj aŭ vurstoj. Salamoj estas longaj cilindroj el fumaĵita viando, tranĉitaj en maldikaj tranĉaĵoj. Kolbasoj estas malpli longaj kaj vurstoj malplej longaj. Sinko estas delikata fumaĵita viando. Konservoj estas viando konservita en lada skatolo. Somere oni trinkas bieron, vinon, brandon aŭ dolĉan likvoron, kiuj enhavas alkoholon. Kiu multe trinkas alkoholaĵon, tiu drinkas. Sen alkoholo estas limonado, mosto el fruktaĵ suktoj, cidro el pomoj, sodakvo kaj minerala akvo.

La tagmanĝo estas en la mezo de tago. Unue oni manĝas supon. Speciala supo el bova viando estas buljono. Konsomo estas el aliaj krudaĵoj. Post la supo estas viando kun almanĝaĵo. Viandon liveras animaloj, kiujn oni tial buĉas. Plej ofte estas viando el bovo, bovido, porko, ŝafo, kaprido, ĉevalo, kortbirdoj, kuniklo, ĉasbestoj, ĉasbirdoj, fiŝoj kaj aliaj animaloj. Almanĝaĵo estas terpomoj, farunbuloj, specialaj estas knedlikoj, rizo, pastaĵoj, ekzemple nudejoj, vermiĉeloj, makaronioj, diversaj legomoj, salato, saŭkraŭtoj, spinaco, kompotoj, saŭcoj, gulaŝoj. Senvianda manĝaĵo estas diversaj farĉitaj farunbuloj, ovaj aŭ legomaj manĝaĵoj. Alfine oni manĝas deserton kaj trinkas.

Posttagmeza intermanĝo aŭ lunĉo kaj vespermanĝo estas similaj. Oni manĝas ĉirkaŭ certaj horoj laŭ eblecoj, reveno el laboro aŭ vojaĝo. Oni manĝas el teleroj per manĝilaro, al kiu apartenas kulero, forkeo kaj tranĉilo, krome specialaj manĝiloj, ion oni povas teni en manoj. Manĝoj estas alportataj al la tablo sur platoj, en tasoĵ aŭ pladoj, en gameloj. Gameloj estas uzataj en tendaroj, kazernoj kaj vojaĝoj. En publikaj manĝejoj kaj restoracioj estas kelneroj, ĉe kiuj oni mendas manĝojn laŭ manĝokarto. Preciza vico de manĝoj estas menuo.

La manĝado liveras al homoj necesan energion por vivo kaj laboro. Maltaŭga manĝado sekvigas diversajn malsanojn. Poste oni povas manĝi nur tion, kion la kuracisto permesas, oni havas dieton.

Kemie konsistas manĝaĵo el karbonhidratoj, albuminoj, grasoj, vitaminoj, mineraloj kaj akvo. Ili havas diversajn efikojn, la valoro estas esprimata en mezurunuoj de energio. Tiuĵ estis kalorioj, nun ĵuloj. Tromanĝado gvidas al korpulenteco. Deziro manĝi estas apetito. Oni pligrandigas ĝin per ingredienco. Teorio pri kuirarto nomiĝas gastronomio. Religioj malpermesas al kelkaj okazoj manĝi, la religianoj fastas. Vegetaranoj rifuzas manĝi viandon pro sia konvinko.

GRAMATIKO: 1/ Nomu substantivojn kun sufikso -aĵo en tiu temo kaj uzu ilin en diversaj frazoj. 2/ Nomu ujojn, kiuj estas uzataj dum kuirado. 3/ Klarigu diferencan inter "kuiri" kaj "boligi".

STILO: 1/ Skribu manĝokarton de restoracio. 2/ Preparu semajnan manĝokarton de via familio. 3/ Skribu recepton pri manĝaĵo, kiun vi ŝatas aŭ kapablas kuiri.

DEMANDOJ: 1/ Kiun viandon vi preferas? 2/ Kiu nutraĵo devenas el bestoj, sed oni ne buĉas ilin tial? 3/ Diru horojn, kiam vi manĝas dumtage. 4/ Ĉu vi scias kuiri? Ĉu vi kuiras kaj kiam? 5/ Kiam vi manĝas en restoracio? Kiom kostas restoraciaj manĝoj? 6/ Skribu pri valoro de energio en kelkaj manĝaĵoj.



# KORESPOND DEZIROJ ANONCOJ

30-jara fervojisto havas hobiajn: plastikmodeloj de aviadiloj 1/72, bildkartoj, fotadon, filmadon, vojagadon kaj muzikon. Mi respondos al ĉiuj, ĉiuj landoj, diversaj temoj. Adreso: Petr Knížák, Nám. Pionýrů 315/1, CS-353 01 Mariánské Lázně, Ĉeĥoslovakio.

Ĉe klubo de internacia amikeco en Budišov nad Budišovkou komencis labori Esperanto-sekcio, lernantoj de 5-aj kaj 6-aj klasoj. Ili deziras korespondi kun samaguloj. Adreso: Domo de pioniroj kaj junularo, Esperanto-sekcio, Ĉs.armády 325, CS-747 87 BUDIŠOV n. B., Ĉeĥoslovakio.

18-jara polino kolektas fotojn de kantistoj Stevens kaj Presley kaj de aktoro Bruce Lee. Ŝia adreso: Teresa Gargula, ŚMIECHOWICE 53, 49-322 CZEPIELOWICE, Woj. Opole, Pollando.

19-jara studento interesigas pri turismo, geografio, filmo, li ŝatas aŭskulti muzikon, ankaŭ klasikan, kolektas bildkartojn. Adreso: Jacek Wasik, ul. Zubrzyckiego 48/9, PL-41-605 Świetochłowice, Katowice, Pollando.

Pola familio: 56-jara emerito-ministro Henryk Kosinski, 39-jara edzino Maria Kosinska, instruistino de pola lingvo, kaj 14-jara filo Wojciech - Ĉiuj esperantistoj - deziras korespondi kun ĉiuj Esperanta familio. Ili povas ankaŭ korespondi unuope. Henryk interesigas pri elektroniko kaj ŝatas metie amatori. Adreso: Henryk Kosinski, ul. de Gaulle'a 122/9, 41-800 ZABRZE, Pollando.

42-jara ingeniero elektroteĥnikisto deziras korespondi en Esperanto kun la tuta mondo pri ĉiuj temoj kaj interŝanĝi bildkartojn kaj esperantajjn: Waldemar Roszkowski, PL 19-300 EMK, ul. Wojska Polskiego 56 m 1, Pollando.

24-jarulo interesigas pri turismo, sporto kaj muziko: Paweł Sołtyk, 26-600 RADOM, ul. Gen. Bema 3 m 43, Pollando.

32-jara instruistino interesigas pri literaturo por knaboj, folkloro, turismo, nuntempa literaturo, pedagogio. Adreso: Małgorzata Kaliszewska, Os. 2 Pułku Lotniczego 19/57, PL-31-868 KRAKÓW, Poll.

Junaj geedzoj, laboristo kaj oficistino, interesigas pri ĉiutaga vivo, turismo, vojagoj kaj sporto. Adreso: Mariola kaj Kazimierz Śluz, ul. Paderewskiego 14/131 PL-20-860 WUBLIN, Pollando.

25-jara nova esperantistino interesigas pri turismo, literaturo, muziko, kolektas bildkartojn: Barbara Panecka, 24-100 PULAWY, ul. Kochanowskiego 19/15 Pollando.

23-jara studento, fraŭlo, interesigas pri vojagoj, filatelio, muziko kaj lingvoj: Krzysztof Doberesztyn, 62-110 DAMASŁAWEK, ul. Grunwaldzka 15, Pollando

Deziras korespondi kun geedzoj pri vivo en familia rondo, au pri ĉiuj temoj, li - ĵurnalisto, ŝi - instruistino. Adreso: Jan Bolesław Fabisiak, PL 98-100 ŁASK, ul. Polna 17 m. 3, Pollando.

22-jara flegistino interesigas pri turismo, literaturo kaj modo, kolektas bildkartojn kaj turismajn prospektojn: Krystyna Kapton, ul. Krakowska 9A, 34-410 RABKA, Pollando.

29-jara laboristo interesigas pri turismo, fotografado, naturismo, muziko. Adreso: Grzegorz WIENC, 62-005 OWIŃSKA, ul. Dworcowa 5/9, Pollando.

32-jara fraŭlo deziras korespondi pri landoj, loglokoj, kutimoj, sentoj, agadoj. Interesas lin komputiko, matematiko, numismatiko. Interŝanĝas esperantlingvajjn eldonaĵojn, gazetojn, librojn, vortarojn, kasetojn. Adreso: István Kohári, komputilprogramisto, Thalmann utca 31, H-1139 Budapest, Hungario.

Korespondi deziras Adriano Moure Lorenzo Caridad +3, % Cuba y Colón, Santa Clara Villa Clara, Cuba.

# el la sekretariejo

## 5. sjezd Českého esperantského svazu

Předsednictvo ÚV ČES projednalo a schválilo návrh, aby se 5. sjezd ČES konal ve dnech 11. - 13. září 1987 v Olomouci. Podrobné informace o počtu volených delegátů a průběhu sjezdu dostane každá místní skupina ČES v nejbližší době.

## Nová MS ČES

V Praze pracuje od 1.1.1987 nová místní skupina ČES "Aqualica", která se svou činností zaměřuje na ochranu vod a výstavbu malých vodních elektráren. Máte-li zájem o podrobnější informace o činnosti této místní skupiny, případně o spolupráci, pišete na adresu: Miroslav Tenčíl, Všehrdova 6, 118 00 Praha 1.

## Bor u Tachova

Výstavba rekreačního střediska v minulém roce stagnovala a proto chceme letos zvýšit pracovní aktivitu na dokončení stavby. Brigády se budou konat již v jarních měsících v sobotu a neděli. Do Boru ale nejezděte bez ohlášení předem. Napište nejdříve na svaz a podle termínu brigád dostanete odpověď.

## Předplatné na SANO

Na skladě máme ještě dostatek SANA z roku 1986, které je možné si zakoupit za zlevněnou cenu 16,- Kčs za celý ročník. Za předplatné 24,- Kčs na rok 1987 si můžete zaplatit SANO 87 a tím získáte zajímavé informace z lékařského prostředí. Využijte této nabídky také pro Vaše přátele v zahraničí.

## Kulturní festival v Opavě

Bude se konat ve dnech 18. - 20. září 1987 v rámci 30. ročníku Bezručovy Opavy. Bude zaměřen na 120. výročí narození Petra Bezruče a ke 100. výročí vzniku esperanta. Podrobnější informace přineseme v příštích číslech.

## Nabízíme současné novinky:

samolepky stříbrné a zelené ke 100. výročí	aršík /15 ks/	7,- Kčs
malé stříbrné samolepky	aršík /10 ks/	5,- Kčs
hvězdičky	aršík /25 ks/	7,- Kčs
vlaječka		13,50 Kčs
gramodeska skupiny Barbuloj		16,- Kčs


STARTO - presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská 10, CS-110 01 PRAGO 1, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6-foje jare. Redakta komitato: Jiří Hanousek (grafika arango), Jaroslav Kašparec, Miroslav Malovec, Jiří Patera (responda redaktoro) kaj Helena Štruncová. Presas RUCH Liberec. Transdonita al presejo 15. 3. 1987. Jarabono 24 CSK, por eksterlando 36 CSK aŭ 10,50 NLG, inkluzive de sendkostoj. Abonantoj turnigu al niaj perantoj, al UEA aŭ rekte al nia asocio.

STARTO - nepravidelný věstník Českého esperantského svazu, Jilská 10, 110 01 PRAHA 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Redakční rada: Jiří Hanousek (grafická úprava), Jaroslav Kašparec, Miroslav Malovec, Jiří Patera (odpovědný redaktor) a Helena Štruncová. Povoleno odborem kultury NVP č. 310008385 ze dne 18. 3. 1985. Tiskne RUCH Liberec. Předáno do tisku 15. 3. 1987. Dohlédací pošta Praha 07. Snižovaný poplatek za poštovné povoleno Ředitelstvem pošt Praha pod č.j. P/1-1267 ze dne 6. 4. 1979.

Sur koverto ankoraŭ unu foto el tre bela E- ekspozicio en Tábor

novinka!

# STOJÁNEK na lepicí pásku



Strojek, sloužící k snadnému odvinutí, navlhčení a odtržení potřebného kusu papírové lepicí pásky s vrstvou vodou rozpustného lepidla.

Stojánek včetně vlhčícího válečku je odlit z polyesterové pryskyřice. Trhací hřeben je ocelový s antikorozi povrchovou úpravou.

Při práci se stojánkem se doporučuje přidat do vlhčícího roztoku několik kapek saponátu, aby se zlepšila smáčivost vrstvy lepidla.



Vyrábí: RUCH LIBEREC

Široká ul. 31

PSČ 460 31

telefon 281 47, 233 83

Český esperantský svaz  
110 01 PRAHA 1, Jilská 10

NOVINY

Dohlédací pošta Praha 07  
Snížený poštovní poplatek povolen  
Ředitelstvím pošt Praha  
J. ZN. P/1-1267/79 ze dne 6. 4. 1979